1982 decembro
75-a jaro
n-ro 924 (12)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

60 jaroj de Oomoto kun Esperanto

Vi trovos

sur la paĝo 202 iom ekscese longan redakcian enkondukon al mallonga informo el Rumanio. Vi sentos iom da amaro en tiu enkonduko, vi rimarkos, ke ni preskaŭ perdas paciencon atendante, ke la movada situacio en tiu lando jam foje klariĝu. Ni kompreneble malŝatus, se la rumana esperantistaro vidus en tio ian nian provon malafabli al tiu lando kaj, kiel oni kutimas esprimi tion en la diplomatia ĵargono, "miksiĝi en iliajn internajn aferojn". Kiam ni diras, ke Rumanio mankas al ni en la internacia Esperanto-movado, tio devus soni pli kiel komplimento, ol kiel atako. Eble iu tradukos tiun nian enkondukon al ekstermovaduloj en tiu lando. Nu, kial ne? Tial ni cetere eĉ verkis ĝin. Kial ĉiam simple sidi kaj atendi? "Cent jaroj da atendado", dirus baldaŭ tiu grandioza kolombiano al kiu oni en Stokholmo ĵus transdonis la ĉi-jaran literaturan Nobel-premion. Jes, vi tie en Kolombio, kio okazis kun la Esperanta traduko de la romano "Cent jaroj da soleco" de Gabriel García Marques? Oni (ankaŭ ni) anoncis la laboron super tiu traduko jam antaŭ kelko da jaroj, sed nenio poste aŭdiĝis. Kiam ni lernos la gravecon de la ĝusta momento? Kiel bele estus nun montri al la mondo, ke ni malkovris Marques antaŭ ol la Nobel-Komitato, se jam estus aperinta tiu traduko de antaŭ kelke da jaroj.

La vetero ĉi tie en la nordo estas tia, ke ŝajnas, ke vi ekde januaro spertos iom da ŝanĝoj – ĉefe – en la teknika aspekto de ĉi tiu revuo. Ne timu! Temos pri plibonigoj, plibeligoj kaj aliaj pliaĵoj. Ŝajnas, ke vi devos diri definitivan "Ĝis" al la interkolumnaj linioj kaj la malrekta dekstra marĝeno de la tekstoj. Se ni nun dirus ĉion al vi, forestus poste surprizo. Do, ĝis la surpriza januaro!

Enhavo

201 Lingva problemo: Esperanto kiel pontolingvo de aŭtomata tradukado?
202 Rumanio: Tamen iom da rumanaj novaĵoj! (Mioara Dobre)
203 Landa agado: Kio estas kadrokursoj de FEL? (Jan Bovendeerd)
204 Ĉinio: Refondiĝo de historia organizaĵo (Dai Song-en)
205 Esploroj: Ses psikologiaj tezoj pri la motivoj por lerni Esperanton (Helmut Welger)
206 Ĉeĥoslovakio: Gazetara konferenco en Prago (Jaroslav Klement)
207 Sesdek jaroj de Esperanto en Oomoto: Oomoto persiste pioniras en la praktika utiligo de Esperanto (Eizo Itoo)
210 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 68a Universala Kongreso en 1983)
211 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
212 TEJO-paĝo: Kie kongresi en 1983?
213 Nekrologoj (G.R. Boulanger, A. Breddels, C.H. Dionísio, J. Kraemer, J. Maynar y Duplá, N.R. Smith, L. Thalmaier, A.W. Thomson)
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
216 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Anoncetoj
217 Indekso de la jarkolekto 75 de la revuo "Esperanto"
220 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

La kovrilo

Ampleksa artikolo sur la paĝoj 207 ĝis 209 klarigas la ĉi-fojan kovrilan bildoparon. Apenaŭ necesas aldoni ion ankaŭ ĉi tie. Eble ne estas superflue antaŭrespondi eventualajn atentigojn, ke Oomoto lastatempe sufiĉe uzas ankaŭ la anglan lingvon por siaj internaciaj kontaktoj. Nu, jes, estas tiel, ĉar Oomoto ja ne estas unuavice Esperanta organizaĵo kaj ĝi prave serĉas la plej efikan vojon por diskonigi sian idearon. Tamen, pri la sincereco de la inklino kaj apogo al la Internacia Lingvo flanke de Oomoto oni ne rajtas dubi. Okaze de la unika jubileo de la ligoj inter Oomoto kaj Esperanto, ni en la Movado provu memori, ke eĉ se la japana religia organizaĵo ne sukcesis peri al ni sian religian idearon, ĝi ja peris al ni la plimulton de tio, kion ni nun scias pri Japanio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza **Ke**hlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 924(12), december 1982. Verantw. uitgever G. Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belg.

Esperanto kiel pontolingvo de aŭtomata tradukado?

En nia maja numero (p.98) aperis mallonga sciigo pri projekto, kiu planas uzi Esperanton kiel pontolingvon en aŭtomata tradukado. Intertempe, Eŭropa Komunumo ekinteresiĝis pri la projekto kaj decidis finance subteni ĝin. Okazis ankaŭ pluraj interŝanĝoj de vizitoj inter la firmao, kiu ideis la tuton, kaj UEA, kiu ekrolis kiel konsilanto. La sekva teksto provas klarigi pri kio fakte temas.

BSO (Buro voor Systeemontwikkeling / Buroo por sistemevoluigo) estas unu el la plej grandaj nederlandaj entreprenoj por komputila programado. Unu el ĝiaj esploraj fakoj jam de kelka tempo prilaboras sistemon por t.n. DLT (distribuita lingvotradukado). Tiu sistemo celas ebligi rapidan aŭtomatan tradukadon inter diversaj naciaj lingvoj. La projekto de BSO fundamente diferencas de la multaj pli fruaj – kaj plejparte nesukcesaj – provoj pri aŭtomata tradukado. Tiun novan aliron al la problemo inspiris la nunaj kaj tuj estontaj evoluoj de la komputila tekniko kaj de la scienco pri informretoj.

En la nuna stadio, BSO – kune kun la dana firmao Christian Rovsing – laboras pri studo, komisiita de la Komisiono de Eŭropa Komunumo, pri la teoria aplikebleco de tiu sistemo. Por tiu komenca studo EK disponigis subvencion de kvaronmiliono da guldenoj.

Kial ĉi tiu projekto aparte interesu niajn legantojn? Unuavice pro tio, ke la projekto antaŭvidas uzon de pontolingvo, kaj ke oni elektis tiucele Esperanton. Kiel tradukfakuloj jam ofte argumentis, la uzo de pontolingva stadio en la tradukproceso prezentas gravajn avantaĝojn, kiam temas pri tradukado inter pluraj diversaj lingvoj.

La avantaĝoj de Esperanto en tiu rolo, laŭ BSO, estas, unue, la granda kvanto de gramatikaj kaj similaj "etikedoj" (finaĵoj, afiksoj ktp) kaj, due, la relative malalta nombro de la vortelementoj (radikoj, afiksoj ktp). Tiu lasta avantaĝo ĉefe evidentiĝas, kiam temas pri stokado aŭ transsendado de tekstoj. Kalkuloj pruvis, ke tiu karakterizo de la Internacia Lingvo ebligas multe pli ekonomian kaj koncizan enkodigon, ol tio eblas kun aliaj lingvoj.

Ĝuste tiu ekonomio de la transsendo de informoj aŭ tekstoj ludas centran rolon en la projekto DLT. La vorto "distribuita" en la nomo de tiu projekto aludas al la principa apartigo de la du stadioj de la tradukproceso: la traduko el la fontolingvo kaj la traduko al la cellingvo.

Estas antaŭvidate, ke traduko al la cellingvo okazos ĉe la "konsumanto" de la teksto, ekzemple, ĉe la hejma televidaparato, tute sendepende de la origina traduko el la fontolingvo al Esperanto. Por doni ekzemplon: brita veterprognozo estus tradukita al sia pontoversio (Esperanto), kiu estus disponebla por internacia distribuo. Kiel dirite, gravaj ŝparoj devus evidentiĝi ĉe la distribuo de tiu koncize kodigita formo. Se nun nederlanda abonanto de la informservo Viditel petas tiun veterprognozon, la teksto aperos sur la hejma ekrano en la nederlanda aŭ alia lingvo elektita de la abonanto. Tion ebligos, laŭ la projekto de BSO, miniatura procesilo (tradukilo), instalita ĉe la televidaparato. Amasproduktado de tiaj procesiloj ebligus redukti ilian koston al pagebla nivelo.

La relativa facileco de tiu parto de la tradukproceso (el Esperanto al la dezirata cellingvo) dependas de kelkaj faktoroj. Unue, en la limoj de la nuna projekto temas pri tekstoj relative simplaj: informoj zorge verkitaj, kun mallongaj frazoj kaj antaŭvidebla vortprovizo. Due, ĉiuj eblaj dusencaĵoj kaj malklaraĵoj devos esti anticipe solvitaj dum la antaŭa parto de la procezo, nome la traduko al Esperanto. Oni imagas, ke la entajpantoj de la origina teksto "konversacios" kun la komputilo, kiu atentigos pri ĉiuj sencaj duboj kaj postulos klarigon. Kompletigoj kaj ĝisdatigoj de la vortaro kaj programoj, entenataj en la tradukiloj ĉe la abonantoj, okazos aŭtomate tra la telefonreto.

Unu bela perspektivo de la sistemo DLT, se ĝi efektive povos realiĝi, aparte interesas nin en la Esperanto-movado. El la ĵusa priskribo devus esti evidente, ke la "konsumantoj' mem de la distribuataj informoj decidos pri la lingvo de la konsumado. Tiu principo povas simile aplikiĝi, ekzemple, ĉe la subtitoloj de la televidaj filmoj ktp.

BSO esperas, ke ĉi tiu enkonduka studo konvinkos la Komisionon de EK financi venontjare la praktikan ellaboron de la unua tia eksperimenta traduksistemo. La dana kunlaboranto de BSO intertempe pristudas la maŝinteknikajn kaj merkatajn aspektojn de la projekto. Kiel konsilantoj rolas fakuloj el pluraj eŭropaj universitatoj kaj ankaŭ – jam de la unuaj paŝoj – UEA, kiu krom konsiloj pri Esperanto plenumas ankaŭ difinitajn lingvajn esplorojn.

La projekto de BSO en la nuna stadio signifas nenian "venkon" de Esperanto, i.a. ĉar ja temas nur pri projekto. En la provoj solvi la problemon de la aŭtomata tradukado ĝi donas al Esperanto la rolon de pontolingvo, de helplingvo. Ke tio en la nuna situacio sonas realisme pruvas ankaŭ la fakto, ke la Komisiono de EK pretis eĉ finance subteni la esplorojn de inĝ. Ton Witkam, kiel nomiĝas la gvidanto de la projekto ĉe BSO en Utrecht (Nederlando).

RUMANIO:

Tamen iom da rumanaj novaĵoj!

Antaŭ iom pli ol kvar jaroj (vidu nian revuon de novembro 1978, p.193), ni skribis tute entuziasme pri la reorganizo kaj reviviĝo de la Esperanto-movado en Rumanio. Ankaŭ d-ro Tonkin tiujare vizitis Bukareŝton kaj ricevis tre pozitivajn impresojn pri la Esperanta agado en tiu lando. Ni ĉiuj atendis, ke la internacia Esperanto-movado baldaŭ ekhavos firman bazon ankaŭ en tiu lando kaj ke eblos starigi intensan kunlaboron kun la rumana esperantistaro. Montriĝas tamen, ke tiuj esperoj estis tro fruaj. Nun, post tiom da jaroj, estas preskaŭ lukso ricevi informojn pri Esperanto en Rumanio. Ĝi ankoraŭ restas la sola lando en Eŭropo, kiu havas amasan esperantistaron sed malhavas landan asocion kaj organizitan manieron kunlabori internacie. Oni do preskaŭ perdas paciencon atendante novaĵojn el Rumanio. Kiom longe daŭros tia malkontentiga situacio? Feliĉe, rumanaj artistoj regule partoprenas en Pupteatra Internacia Festivalo en Jugoslavio, kaj ni tiamaniere ricevas almenaŭ unufoje jare la necesan konfirmon, ke la Movado en tiu lando pluekzistas. Atingis nin lastatempe ankaŭ maltrankviligaj informoj el la rumanaj urboj Braŝov, Sibiu, Targu Mures kaj Constanta sed ni provizore ne estas en situacio ekzameni ilian ĝustecon. Feliĉe, atingis nin ankaŭ la raporto, kiu sekvas ĉi-sube.

RENKONTE AL la Monda Komunika Jaro 1983, la Universitato de Timişoara, Societo pri Filologiaj Sciencoj de Rumanio (filio en Timişoara – sekcio pri Esperanto kaj interlingvistiko), regiona lerneja inspektoraro kaj la urba domo de instruistoj organizis la 30an de oktobro 1982 sciencan debaton pri "Komunikebleco en la servo de scienco kaj paco". Partoprenis profesoroj kaj studentoj de la Universitato en Timişoara kaj pluraj aliaj altlernejoj, instruistoj mezlernejaj kaj reprezentantoj de la gazetaro kaj radio.

La tezoj de la debato estis formulitaj fare de prof. d-ro Ignat F. Bociort, kiu ankaŭ gvidis la interesan kvarhoran interŝanĝon de opinioj. La ĉefaj referantoj estis prof. d-ro Albert Francisc (sociologo, koresponda membro de la rumana Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj), prof. d-ro Pavel Petroman (anstataŭa ĝenerala inspektoro de la lernejoj en la regiono), prof. d-ro Ion Iliescu (estetikisto), d-ro Cezar Apreotesei (nuna estro de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko), d-ro Nicolae Pitrop (el la filozofia fako de la Universitato) kaj prof. Elisabeta Lacrima Dobre (el la filologia fako). Pli ol 15 aliaj profesoroj kaj studentoj partoprenis la debaton, kiu entute montriĝis altnivela scienca kunveno de granda sukceso.

Oni diskutis pri la rolo de la informado en la scienco kaj tekniko, en lerneja procezo, en literaturo kaj arto, pri lingvaj obstakloj en la tradukado, en internaciaj sciencaj kunvenoj kaj aliaj internaciaj kontaktoj, pri la neceso raciigi kaj faciligi la lingvan komunikadon pere de internacia lingvo.

Ĉi tiu debato estis sekvo de simila aranĝo, okazinta en la sama universitato kelkajn monatojn pli frue, kiun organizis Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko de la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, kunlabore kun la prestiĝa Akademio "Stefan Gheorghiu" pri la Demokratigo de Internaciaj Sciencaj kaj Kulturaj Rilatoj. Tiun kunvenon, malfermitan same per la tezoj de prof. Bociort, partoprenis sciencistoj el ses universitatoj kaj altlernejoj kaj Esperantaj rondoj el la tuta lando. Al ĝi ligiĝis ankaŭ dutaga esperantologia kaj interlingvistika sesio (kun 26 referaĵoj) kaj riĉa kultura programo, kompetente prizorgita de d-ro Apreotesei.

Pri ambaŭ aranĝoj raportis sciencaj revuoj kaj lokaj periodaĵoj.

Mioara Dobre

Pro manko de movadaj fotoj el Rumanio, jen folklora sceno el la montara regiono de tiu lando: Junulinoj per kornoblovado invitas al tradicia popoldanca festo.

LANDA AGADO:

Kio estas kadrokursoj de FEL?

VIDANTE LA ALPROKSIMIĜON de la Centjara Jubileo kaj pripensante la evoluon de Esperanto, oni neeviteble venas al la konkludo, ke vera eksplodo, vera penetro de la Internacia Lingvo en la socion neniam fakte okazis. Ĉu kulpigi la socion pro tro da antaŭjuĝoj, maltro da intereso, aŭ konfesi, ke pri la malabundo de niaj sukcesetoj kulpas ni mem?

Ni rigardu la kutiman strukturon de la Esperanto-movado: estraro – komitatanoj – membroj. Alivorte, kapo (estraro) kaj piedoj (membroj) ligitaj per ŝnuro (komitatanoj). Mankas vera kadro ĉirkaŭ kiu konstrueblus la movada piramido sur firma bazo.

Tiun mankon sentis jam antaŭ jaroj la tiama prezidanto de Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj estrarano de UEA, d-ro P. Denoël, kaj la verkinto de ĉi tiu artikolo. Ili konsciiĝis, ke pri la manko mem iel kulpas la estraroj de la landaj asocioj, ĉar ili devus respondeci pri la formiĝo kaj edukado de taŭgaj elementoj, kompetentaj kadromembroj (aktivuloj).



Jan Bovendeerd (dum la Kongreso en Antverpeno): Kiel eduki novajn aktivulojn por la Esperanto-movado?

En la realo, la strukturo de nia movado ne rajtas tro diferenci de alispecaj entreprenoj. Ne malhaveblas tie kvar elementoj: decidantoj (estraro); esplorantoj/konsilantoj (komisionoj kaj fakaj kunlaborantoj); gvidantoj (kadro); plenumantoj (membroj). En la strukturo de UEA rekoneblas ĉefe nur la du unuaj, la du sekvaj apenaŭ disponeblas.

Kion fari, do? Organizi la edukadon de kadromembroj por certigi la ligilon inter decidantoj kaj plenumantoj, por **gvidi la Movadon ĉe la bazo**.

Sed kiun edukprogramon kunmeti? Kiamaniere agi? Post longa cerbumado, post konsultado de UEA-instancoj (inkluzive de la tiama prezidanto, H. Tonkin), oni decidis dum la 65a UK en 1980, ke Flandra Esperanto-Ligo (FEL)* faru eksperimenton kaj raportu pri ĝi en la 67a UK en Antverpeno.

Tamen, malgraŭ tiu promeso, ni ankoraŭ ne sciis kion ĝuste fari, ĝis ni finfine trovis bazon en jenaj principoj:
– klopodi instrui Esperanton en medio neinformita verŝajne ne donos rezulton;
– lernado de Esperanto kiel celo al si mem, apenaŭ havas sencon;
– instruado de la lingvo, sen ebleco de praktika aplikado, ne garantios progreson. (Laŭ *Esperanto en perspektivo*, ĉap. 18.2.3., p.570)

Sed, por informi, ne sufiĉas nur esti informita; por instrui al aliaj, ne sufiĉas esti mem instruita; por ebligi la aplikadon de Esperanto, ne sufiĉas nur okazigi kunvenon pri tio. Oni estu ankaŭ – unuavice eĉ – kompetenta; oni alproprigu al si la necesajn teknikajn kaj praktikajn sciojn. Ĝuste tiujn teknikajn sciojn ni peru al niaj aktivuloj.

La enhavo de la instruprogramo estu do – ŝajnis al ni – tia, ke la instruontoj de la lingvo kaj de ĝia uzo, eksposedu la teknikon de la instruado. (Ni ne forgesu, ke multaj kursoj estas gvidataj de neprofesiaj instruantoj.) kaj konu la Movadon, ĝiajn historion kaj literaturon. Simile, la informantoj/propagandistoj konu la Movadon kaj mastru la teknikojn de la komunikado kaj de publika parolarto. Fine, la kreantoj de aplikeblecoj (grupestroj ekz.) ankaŭ konu la Movadon kaj – ĉefe – la kunven- kaj debat-teknikojn.

Surbaze de tio, la unua eksperimento pri la kadrokursoj de FEL realiĝis pere de serio de tut-tagaj instru- kaj preleg-debatoj jene: metodiko/didaktiko; historio/literaturo; parolteknikoj; kunven- kaj debat-teknikoj; komunikado (inform- kaj propagand-teknikoj). La celo estis doni al la partoprenantoj orientiĝon kaj direkton al propra pliperfektigo. La kursojn partoprenis dudeko da personoj. Ĉiuj estis entuziasmaj kaj kelkaj el ili jam funkcias pri estraraj taskoj sur landa nivelo.

Certe la serio ne estas kompleta, certe ĝi ne estas perfekta. Temas ja pri eksperimento kun neeviteblaj mankoj. Ekzemple, en la kurso pri metodiko/didaktiko al la instruteknikoj estonte oni aldonu konatiĝon kun la disponeblaj lernolibroj. La historio kaj literaturo ne plu okazos en la sama tago, sed ricevos ĉiu tuttagan atenton. Plie, ni pensas pri kompletigoj (ekzemple, kiel starigi kurso-rondojn, kernojn ktp).

Dum kunsido de la Komisiono pri Edukado, en la UK en Antverpeno, oni decidis fari duan eksperimenton pri kadrokursoj iom pli internaciskale: en la trilanda angulo Aachen (FR Germanio), Lieĝo (Belgio) kaj Maastricht/Heerlen (Nederlando). Kunmetiĝis komisiono, gvidota de M. Demonty kaj A. Mertens-Goos-

---

* FEL, ĉar post la politikaj (kaj movadaj) strukturŝanĝoj en Belgio, la verkinto de la teksto apartenis al Flandra Esperanto-Ligo, kaj intertempe ankaŭ d-ro Denoël ne plu estis prezidanto de Belga Esperanto-Federacio.

sens (prezidanto kaj ĝenerala sekretario de BEF), kiu intencas ekagi en februaro surbaze de la spertoj akiritaj en la unuaj kadrokursoj de FEL. Intertempe FEL okazigas sian duan kursoserion, ekde oktobro 1982. Pri la rezulto de tiu dua eksperimento ni esperas povi raporti en la Budapeŝta UK venontjare.

La bazaj tekstoj de la unua serio kunmetiĝis kajerforme kaj estas haveblaj kontraŭ 60 belgaj frankoj (plus sendokostoj) ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno, Belgio, ĝirkonto 000-0265-338-43.

Rilate al la lingvokursoj kaj memorante la konsilon de H. Hodler, ne instrui nur la lingvon sed ankaŭ ĝian uzon, FEL kunmetis broŝuron *Esperanto, kion mi povas fari per tio?*, kun la helpo de UEA kaj de diversaj landaj asocioj. Ĝia celo estas kompletigi la kursojn per pritrakto de ĝia enhavo en la kursoj mem. Tiel la lernantoj de la lingvo sciu samtempe kiel plej bone profiti de la lernita lingvo. Ankaŭ tiu broŝuro estas havebla ĉe FEL sampreze kiel la unua (ĉe la Libroservo de UEA ĝi kostas 3,60 gld).

Jan Bovendeerd

ĈINIO:

Refondiĝo de historia organizaĵo

LA 11an DE NOVEMBRO ĉi-jare, en Ŝanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio (ĉ. 11 milionoj da loĝantoj), fondiĝis Ŝanhaja Esperanto-Asocio. S-ro Chen Yi, tre altranga politika funkciulo de la urbo kaj malnova esperantisto, ĉeestis la solenaĵon kaj faris paroladon. Oni laŭtlegis ankaŭ salutmesaĝon de s-ro Bakin, membro de Honora Patrona Komitato de UEA kaj nun honora prezidanto de ŜEA, kiu ne povis ĉeesti pro malsano. Tiuj du salutoj entuziasmigis pli ol 200 ĉeestantojn. La fondkunvenon salutis ankaŭ esperantistoj el Pekino, Suzhou kaj aliaj lokoj. S-ro Liu Huozi estas elektita kiel prezidanto de ŜEA. Li estas malnova esperantisto, komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo kaj elstara funkciulo en la kultura vivo de Ŝanhajo. La fondkunveno altiris al si ankaŭ raportistojn de la televido kaj ĵurnaloj de la grandurbo.

Ŝanhajo estis la centro de la ĉina Esperanto-movado en la unuaj jardekoj de la jarcento, kaj multaj ĉinaj veteranaj esperantistoj debutis kaj aktivis en tiu urbo. Jam frue en 1909 en Ŝanhajo aperis la unua nacia organizaĵo – Ĉina Esperanto-Asocio –, kiu havis pli ol tricent membrojn post tri jaroj. La Asocio eldonis la gazeton *La mondo* kaj havis korespondan fakon, kies lernantoj troviĝis en multaj lokoj de la lando. En 1919 s-roj Hujucz, Bakin kaj aliaj fondis en la urbo Ŝanhajan Esperanto-Asocion kun koresponda lernejo, biblioteko, librovendejo kaj la gazeto *Verda lumo*. La Asocio multe kontribuis al la Ĉina E-movado dum pli ol 10 jaroj.

En 1928 Hujucz kiel reprezentanto de ŜEA ĉeestis la 20an UK en Antverpeno. En 1931, ŜEA alvokis por organizi la Movadon tutlande. Reagis multaj societoj kaj unuopuloj. Sed la plano ne realiĝis pro la japana atako de Ŝanhajo en januaro 1932. Fakte, pro sia bone organizita, sistema laboro, Ŝanhajo tiam grandparte reprezentis la ĉinan E-movadon.

Pro la invado de la lando en 1931 kaj pro la Rezistmilito, kiu komenciĝis en 1937, la Movado en Ĉinio ne povis normale evolui ĝis 1949. Tamen, en tiu periodo junaj ŝanhajaj esperantistoj aktivis en la sekreta organizaĵo – Ĉina Proleta Esperantista Unio – fondita en decembro 1931. La Unio propagandis Esperanton inter laboristoj kaj sekrete eldoniĝis *PEK-Bulteno*, por informi la mondan esperantistaron pri la kruelaĵoj de la agresantoj kaj pri la liberiga batalo de la ĉina popolo.

Poste, en 1933, la Unio sukcesis starigi publike agantan organizaĵon – Ŝanhaja Esperantista Ligo – kaj iniciatis ties organon *La mondo*. La revuo elmetis la devizon "Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio". La ĉinaj esperantistoj persiste laboris kaj batalis por la liberiĝo, kaj la ĉina Movado vigle disvolviĝis. Tamen, post la falo de Ŝanhajo, en 1937, la plejparto de ŝanhajaj esperantistoj devis fuĝi aliloken.

En aŭgusto 1949, tri monatojn post la liberiĝo de la grandurbo, Ŝanhaja Esperantista Ligo revigliĝis kaj ekeldonis la revuon *Popola mondo*. Ĝi funkciigis Esperanto-kurson ĉe la urba radiostacio trifoje semajne. La revigliĝo de la Movado en Ŝanhajo inspiris alilokajn esperantistojn kaj akcelis pli vastan reviviĝon de la ĉina E-movado. Post la fondiĝo de Ĉina Esperanto-Ligo en 1951, Pekino fariĝis la centro de la ĉina E-movado, kaj multaj ŝanhajaj esperantistoj iris al Pekino por labori.

Nun en Ŝanhajo ankoraŭ troviĝas kelkaj veteranaj esperantistoj, kiel ekz. Bakin, Chen Yi, S.J. Zee (fama ĉina esperantisto-poeto), Sanio, Pandiŝo, Censinio. Tie regule okazas pluraj Esperanto-kursoj, kaj en la Orient-ĉina Normala Universitato la Internacia Lingvo estas elektebla kiel deviga kurso por fremdlingvaj studentoj. La nuna refondiĝo de ŜEA markas, ke la Movado en Ŝanhajo eniras novan etapon. Oni nun certas, ke Ŝanhajo denove ludos gravan rolon en la ĉina Esperanto-movado, kiel ĝi tion faris dum pluraj jardekoj de la ĝisnuna historio de Esperanto en Ĉinio.

Dai Song-en



Pandiŝo (Pan Dishu) aktivas en Ŝanhajo jam duonan jarcenton kaj nun instruas la lingvon en unu el la tieaj universitatoj.

ESPLOROJ:

Ses psikologiaj tezoj pri la motivoj por lerni Esperanton

En broŝuro de Germana Esperanto-Instituto, Helmut Welger, juristo kaj psikologo, traktis germanlingve la temon de ĉi tiu kontribuaĵo. Ni petis lin reverki la tekston por la legantoj de nia revuo. Welger akceptis, ĉar li opinias, ke necesas "veki ĉe la esperantistaro la konscion pri la (soci-)psikologiaj kialoj de la lernado de Esperanto, kaj prepari grundon por scienca enketo pri tiuj kialoj." Ni trovis, ke kelkaj konsideroj de Welger plene kontraŭas la ĝisnunan praktikon en la informado pri Esperanto, sed ili pro tio ne ŝajnas malpli konvinkaj.

Tezo 1: *La homoj pretas lerni la plej malfacilajn lingvojn, se ili opinias, ke tio sufiĉe utilos al ili. Sed se ili opinias, ke la lernado ne alportus ian utilon, tiam ankaŭ la plej rimarkinda lingvistika supereco, la plej granda facileco de la gramatiko ktp. ne igas ilin lerni tiun lingvon. Tio validas ankaŭ por la lernado de Esperanto.*

Tezo 2: *Tiu utilo estas por la unuopa homo nenio alia ol la eblo kontentigi* aktualajn, personajn *kaj* forte sentatajn *bezonojn. Ju pli fora en la estonteco estas la eblo kontentigi tiajn bezonojn helpe de Esperanto, des malpli da alloga forto ĝi havas. Plie, superpersona utilo motivas la unuopan personon des malpli, ju malpli ĝi estas ankaŭ persona utilo.*

Rimarko: Ni ĉiuj deziras i.a. la "finan venkon", nome la ĝeneralan akceptiĝon kaj mondvastan enkondukon de nia lingvo. Sed **kiam** – eĉ ĉu – tiu fina venko okazos, tion ni ne scias. Laŭ Zamenhof, tio eble daŭros kelkajn centojn da jaroj. Ankaŭ se vi estas pli optimismaj: La psikologio klarigas, ke ni ĉiuj nepre havas pli proksimajn motivojn por okupiĝi pri Esperanto. Tio ne signifas, ke la finaj celoj de la Esperanto-movado estas sensignifaj aŭ senefikaj. Male, ili helpas determini la kadron, interne de kiu ni elektu, surbaze de nia aktuala motivaro, la adekvatajn eblecojn de kontentiĝo.

Tezo 3: *Io analoga validas por la sinteno de ĉiuspecaj organizaĵoj.*

Tezo 4: *Por trovi argumentojn por Esperanto, kiuj motivas la unuopajn homojn, oni do devas esplori,* kiajn personajn bezonojn – kiel eble plej fortajn – Esperanto povas nuntempe plenumi. *La argumentoj tiamaniere trovitaj devas esti elmontrataj ĉe reklamado kaj informado; ĉiuj aliaj argumentoj, kiuj estas "nur" ĝustaj sed ne motivantaj, povas esti nur help- kaj krom-argumentoj.*

Rimarko: Ni povas provi solvi tiun kernan problemon helpe de sperto kaj intuicio. Ankoraŭ pli bone estus, enketi ĉe iom granda nombro da homoj. La enketa demandaro devas esti science formulita, tiel ke ankaŭ ne klare konsciaj, nekonsciaj kaj nekonfesitaj motivoj videbliĝas.

Tezo 5: *Jenaj argumentoj estas aŭ nur malforte aŭ tute ne motivantaj la lernadon de Esperanto:*

a) *La malŝparado de mono pro tro multaj tradukoj.*

Rimarko: Tiu argumento havas tro malrektan rilaton al personaj bezonoj. La unuopa persono ne senpere elspezas monon por tio. La interligiteco kun la alteco de liaj aŭ ŝiaj impostoj estas tro malrekta; la procentaĵon de la tiel kaŭzitaj impostaj plielspezoj ĝenerale eĉ la esperantistoj ne povas sciigi. Sed se persono lernas Esperanton, tiam ĝi ŝparas eĉ ne unu cendon. Do tiu argumento povas esti alloga nur por organizaĵoj aŭ ŝtatoj.

b) *Granda* estonta *utilo per la uzado de Esperanto kiel dua lingvo de ĉiuj homoj.*

Rimarko: Neniu scias, ĉu kaj kiam Esperanto venkos; tial la argumento ne forte motivas la lernadon de Esperanto. Vidu ankaŭ la rimarkojn al tezoj 2 kaj 6a.

c) *La neŭtraleco de Esperanto.*

Rimarko: Tiu argumento estas malpli taŭga, almenaŭ en la okcidentaj industriŝtatoj. Malmultaj homoj kontestos ĝian ĝustecon; sed ĝi ne kapablas forte logi al Esperanto, interalie, ĉar la plej multaj homoj loĝantaj en la menciitaj ŝtatoj ne sentas sin lingve diskriminaciataj, ĉu per la angla, ĉu per iu alia lingvo. Male, multaj estas fascinitaj de la angla, kaj tute pretas akcepti ĝin kiel internacian lingvon, kvankam ĝi ne estas supernacia-neŭtrala. Ili akceptas kaj admiras ĝin ĉefe pro la prestiĝo de la anglalingva ŝtato Usono, prestiĝo, kiun kaŭzas ties politika-militista potenco, tekniko, kulturo, popmuziko, junulara vivstilo ktp.

Tamen ni neniel provu rekte kontraŭbatali la anglan, ĉar ni tiam aspektus ege donkiĥotaj kaj sektecaj. Laŭdus nin eble naciistoj kaj ŝovinistoj – sed tiuj entute ne emas uzi fremdajn lingvojn, ĉu la anglan, ĉu Esperanton.

Tezo 6: *Taŭgajn argumentojn liveras jenaj bezonoj (la listo ne estas kompleta!):*

a) *Identiĝo kun grupo kaj kulturo; grupaneco.*

Rimarko: La usona lingvisto Edward Sapir (1884-1939) skribis: "La akirado de eĉ la plej supraĵaj konoj de fremda nacia lingvo por la fantazio signifas certagradan identiĝon kun la popolo aŭ kulturo de tiu lingvo. La praktika valoro de tia identiĝo ofte estas nulo.

Ni jam kelkfoje skribis, ke neniam antaŭe okazis tiel vasta agado por Esperanto en Afriko (vidu nian numeron de julio/aŭgusto ĉi-jare). UEA povas financi tiun agadon nur per kontribuaĵoj al la FONDAĴO AZIO-AFRIKO. La kaso de tiu fondaĵo estas tute malplena. Pensu pri tio, se iel eble, dum la venontaj semajnoj!

Sed ĉiu konscie konstruita internacia lingvo devas renkonti la grandan malfacilaĵon, ne esti sentata kiel reprezentanto de certa popolo aŭ certa kulturo. Tial ĝia ellernado havas malpli grandan simbolan signifon por la ordinara homo, kiu restas blinda rilate la fakton, ke tia lingvo, ĉar ĝi ja nepre devas esti facila kaj reguleca, forigus unu fojon por ĉiam multajn el liaj edukiĝaj problemoj kaj praktikaj malfacilaĵoj. Sole la estonteco montros, ĉu la logikaj avantaĝoj kaj la teoria neceso de internacia lingvo povos venki la reziston vaste simbolan, kiu kontraŭas ĝin."

Kiel do venki la reziston simbolan, kaŭzitan de tio, ke oni ne sentas Esperanton kiel reprezentanton de kulturo, de popolo?

Ni scias, ke Esperanto fakte **ja** estas ligita kun kulturo, nome kun la spiritaj kaj artaj manifestiĝoj de la interkompreniga, homfratiga ideo. Esperanto mem estas manifestiĝo de tiu ideo, kaj la esperantistaro, ja sam**ide**anaro, estas portanto (kvazaŭ popolo) de tiuj ideo, lingvo kaj (se vi volas, sub- aŭ inter-)kulturo.

La ideo de interkompreniĝo tre aktualas en la nuna tempo de kreskanta militodanĝero kaj pacosopiro. Per si mem ĝi neniel aspektas sekteca, sed tre alloga por multaj homoj. Do, ni povas forigi unu el la ĉefaj obstakloj kontraŭ la Internacia Lingvo, elmontrante ĝiajn idean bazon, disvolviĝantan kulturon kaj portantaron.

Vi certe jam rimarkis, ke la menciita ideo estas nenio alia ol la t.n. Interna Ideo de Esperanto. Ne lasu impresi vin de la malŝatantoj kaj neantoj de tiu ideo. Ili neglektas la psikologian situacion de la scivolantoj pri Esperanto. Kuraĝe emfazu la Internan Ideon kiel sencon kaj ekzistokialon de Esperanto. Esperanto eĉ pli estas ideo kun Interna Lingvo ol lingvo kun Interna Ideo.

Identiĝo kun tiuj etike altvaloraj ideo, kulturo, kaj ties portantaro povas helpi kontentigi la homan bezonon je memestimo.

Lokaj Esperanto-grupoj, krome, povas kontentigi la samajn bezonojn kiel aliaj soci-emociaj libertempaj grupoj.

b) *Vojaĝaj kontaktoj, leteraj kontaktoj.*

Rimarko: Esperanto povas helpi aparte bone kontentigi kelkajn kombinaĵojn de diversaj motivoj: vojaĝemo, kontaktemo, scivolo pri fremdaj landoj, kulturoj aŭ vivmanieroj, filatelaj interesoj. Tre gravas doni konkretajn informojn, kiel oni povas utiligi la ĉi-koncernan potencialon de Esperanto (internaciaj adresaroj ktp).

c) *Diversspecaj bezonoj pri informado kaj distro.*

Rimarko: Tiaj bezonoj povas esti kontentigataj de libroj kaj gazetoj. Tiu ĉi argumento ekhavos plenan forton nur kiam la nunaj mankoj de la Esperanto-literaturo, precipe koncerne sciencon kaj teknikon, estos forigitaj.

ĉ) *Intereso pri lingvoj.*

Rimarko: Tiun ĉi intereson ja sentas nur malplimulto, sed tiaj maloftaj homoj tamen ĝis nun verŝajne konsistigas la plejmulton de la esperantistaro. La kialo de tiu ĉi fakto estas, ke la ĝisnuna informado pri Esperanto ĝenerale tre emfazas la lingvon mem, tiel allogante ĝuste la lingve speciale interesitajn homojn.

Estonte ni emfazu almenaŭ samgrade la eksterlingvajn allogaĵojn, kiujn disponigas Esperanto, aŭ, pli ĝuste, la Esperanto-movado. **Alie homoj ne speciale interesitaj pri lingvoj – do la plejmulto de la homaro – neniam aliĝos al nia movado.**

d) *Plifaciligo de la lernado de aliaj lingvoj helpe de Esperanto-konoj.*

Rimarko: Kelkiuj opinias, ke oni evitu tiun argumenton, ĉar Esperanto tiel helpas siajn "konkurantojn". Sed fakte la "konkurantoj" tiel eĉ pli helpas Esperanton, ĉar la motivo lerni ilin parte transformiĝas en motivon lerni Esperanton, dum malamika nehelpemo kontraŭ "konkurantoj" neniel utilas al Esperanto.

Helmut Welger

ĈEĤOSLOVAKIO:

Gazetara konferenco en Prago

''DOKTORO ZAMENHOF kuracis okulojn, sed ŝajnis al li, ke ankaŭ la mondo estas kuracenda. Li elpensis do antaŭ 95 jaroj Esperanton. La mondlingvon, kiu estas nenies gepatra lingvo kaj antaŭ kiu ĉiuj nacioj egaliĝas. Zamenhof mortis, Esperanto vivas. En scienco, literaturo, turismo. Milionoj uzas ĝin kaj la intereso por ĝi ascendas ĉie en la mondo. Certe, ĝi ne povas esti ĝenerala kuracilo por la plej grava malsano de la mondo. Sed ĝi povas helpi por ordoni ĝustan terapion. Cetere, por ke la mondo faru kontrakton pri la paco, ĉiuj ne bezonas paroli Esperante. Sufiĉas, se oni ekhavos komprenon pri ĝi. . .''

Tio estas vortoj de la redaktoro Jan Plachetka el la centra ĉiutaga presorgano de la ĉeĥoslovaka junulara organizaĵo *Mladá fronta* (Juna fronto, eldonkvanto 240 000 ekz), unu el la partoprenintoj de la unua gazetara konferenco dediĉita al taskoj de Esperanto kaj ties movado okaze de la Monda Komunika Jaro 1983. La gazetaran konferencon preparis Ĉeĥa Ĵurnalista Asocio, kunlabore kun Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 18an de novembro 1982 en Prago. La demandojn de 20 ĵurnalistoj respondis ne nur elstaraj funkciuloj de ĈEA, frunte kun d-ro J. Jermář (prezidanto), sed ankaŭ la konata ĉeĥa artisto, d-ro František Kožík, kaj d-ro Detlev Blanke el Germana DR. Simile kiel *Mladá fronta* ankaŭ la ĵurnalo *Svobodné slovo* (Libera vorto, eldonkvanto 230 000 ekz) jam la 19an de novembro publikigis raporton pri la konferenco (sur sia unua paĝo, sub la titolo "Esperantistoj por la paco"). Dum la gazetara konferenco estis emfazita la porpaca rolo de la Esperanto-movado kaj gravaj avantaĝoj de Esperanto por scienco kaj kulturo.

Jaroslav Klement

Oomoto persiste pioniras en la praktika utiligo de Esperanto

En 1982 Oomoto festis 90 jarojn de sia ekzisto, kaj en 1983 ĝi festos 60 jarojn de persista utiligo de Esperanto en siaj internaciaj rilatoj. Oni ne trovas facile alian similan ekzemplon en la historio de Esperanto. Eĉ se oni ne estas religiema, oni pretas riverenci antaŭ tiu multjardeka fideleco al la Internacia Lingvo, des pli ke la origine japana religia movado Oomoto ĉiam pli kaj pli rolas kiel ponto inter aliaj religioj, simile al la rolo, kiun Esperanto volas ludi inter la lingvoj de la mondo. Pro la du jubileoj, ni petis s-ron Eizo Itoo, dojenon de Esperanto en Oomoto, verki por ni la sekvan tekston. Montriĝis necese draste mallongigi la artikolon, pro kio ni ankaŭ ĉi tiel – publike – pardonpetas al la aŭtoro.

REMEMORANTE pri la plej frua tempo de la enkonduko de Esperanto en Oomoton, mi ne povas ne mencii la Majstron Onisaburo Deguĉi (1871-1948), kiu mem lernis nian lingvon kaj baldaŭ poste verkis la unikan vortaron *Poemaro japana por facila memorado de Esperantaj vortoj* (1924), en kiu ĉiuj oficialaj vortoj estis pritraktitaj. Li deklaris, ke li disvastigos tra la mondo la Oomotismon per Esperanto, kaj Esperanton per Oomoto. La verkinto de ĉi tiu artikolo – tiam dudekjara junulo – ankaŭ estis forte influita de lia arda entuziasmo.

Baldaŭ s-ro Hideo Jagi, studento de Kioto-Universitato (poste prezidanto de UEA, 1962-1964), sendis artikolon pri "Oomoto, nova spirita movado en Japanujo", kiu aperis en *Esperanto* de marto 1924. Ĝi estis la unua informo pri Oomoto, vaste legita de la esperantista publiko. Ni citu iom da linioj:

"Tiu religio alprenis oficiale Esperanton en la lasta tempo por disvastigi la principon kaj konigi ĝin al la tuta mondo. Nun ĉiuj religianoj lernas, parolas nian lingvon. Pli rimarkinde estas, ke la esperanta homaranismo ankaŭ koincidas kun la ideo de Dia Amo predikata de ili . . . La principo de Oomoto estas Konkordo, Paco, Pureco kaj Progreso."

Tre viglaj estis la eĥoj de tiu artikolo. Sinsekve alvenadis leteroj al la Oomoto-Centro, esprimantaj interesiĝon kaj petantaj pli detalan informon.

En aŭgusto, 1925, s-ro Koogecu Niŝimura estis delegita al la 17a Universala Kongreso en Ĝenevo kaj varme akceptita eĉ kiel vicprezidanto de la Kongreso. Baldaŭ fondiĝis Eŭropa Centro de Oomoto kaj Universala Homama Asocio, en Parizo. Eldoniĝis grandformata monata organo *Oomoto internacia*. S-ro Niŝimura, kiel direktoro de la Centro sukcese laboris, dank' al kunlaboro de multaj esperantistoj, por disvastigi la ideojn de Oomoto. Daŭris sep jarojn la vigla agado de Eŭropa Centro ĝis 1933, kiam oni devis ĝin fermi pro neeviteblaj kaŭzoj.

Unu jaron pli frue, en 1932, venis al la Centro en Kameoka juna hungara esperantisto, s-ro Jozef Major, por labori inter ni, kiel oficisto modeste salajrata. Lia supera talento ne nur rapide plialtigis la kapablon de esperantistoj de Oomoto, sed ankaŭ multe kontribuis al la ĝenerala Esperanto-movado en Japanujo.

Baldaŭ, en decembro, 1935, eksplodis la furioza atako de la japana registaro kontraŭ Oomoto. Komplete detruiĝis kelkdekoj da konstruaĵoj: preĝejoj, kunvenejoj, oficejoj, loĝejoj, ne nur de la Centro, sed ankaŭ de lokaj organizoj. Preskaŭ ĉiuj libroj kaj artaĵoj verkitaj de Onisaburo estis bruligitaj. Miloj da gvidantoj de Oo-

Te-ceremonio dum la 66a UK pasintjare en Brazilio: Tra la lastaj sesdek jaroj dekmiloj da esperantistoj konatiĝis kun facetoj de la japana kulturo pere de la diversaj aktivecoj de Oomoto.

moto arestiĝis, Onisaburo kun la edzino, bofilo kaj pli ol kvindek gravaj disĉiploj akuziĝis. Ilia karcera vivo daŭris sep jarojn. Dume okazis la Dua Mondmilito kaj nur post la milito Oomoto reakiris la liberecon, sed kun la ruinoj de iama teritorio kaj dispecigita organizo.

Post la milito, paralele kun la reorganiziĝo de Oomoto-movado komenciĝis kaj iom post iom vigliĝadis ankaŭ la agado Esperanta. Reeldoniĝis la revuo *Oomoto*, refondiĝis Esperanto-Propaganda Asocio (fondita en 1924) kun la organo *Nova vojo*. En decembro 1950, s-ro Isao Deguĉi, tiama prezidanto de Oomoto, partoprenis mondfederisman kunvenon en Ĝenevo, kie li renkontis multajn esperantistojn kaj plifortigis en si la konvinkon pri Esperanto. Iom post iom plioftiĝis la vizitoj de eksterlandaj gesamideanoj, kiujn ni volonte akceptadis. En marto 1958, s-ino Doris M. Worcester, angla esperantistino, venis al la Centro la duan fojon por resti unu kaj duonan jarojn. Ŝia restado multe plivigligis nian agadon.

En 1959, nome Zamenhof-jaro, Oomoto sendis min (E. Itoo) al la 44a Universala Kongreso en Varsovio laŭ fervora konsilo de d-ro Jagi, kiu estante tiam vicprezidanto de UEA ne povis mem partopreni. Sola japano en la kongreso, mi ja ĝuis la privilegion de maloftaĵo. Post la Kongreso mi faris prelegvojaĝon dum unu jaro, vizitante 150 urbojn en 22 landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko. 100 el 150 prelegoj oni tradukis en 14 nacilingvojn. Neforgeseblaj estas la varmkoraj kunlaboroj, oferitaj de diverslokaj gesamideanoj. Mi multon lernis per tiu vojaĝo.

En julio, 1963, okazis memorfesto de 40-jara jubileo de Esperanto en Oomoto kun partopreno de 300 esperantistoj. Inaŭguriĝis la Esperanto-monumento monolita kun la vortoj ĉizitaj sur ĝi: "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo." Fakte ĉi tiu estis la titolo plej ofte uzita por miaj prelegoj dum la menciita vojaĝo, ĉar ĝi koncize montras la ĉefajn direktojn de Oomoto-movado kunigita kun Esperanto.

En la sama jaro s-roj Kiotaro Deguĉi kaj Joŝimi Umeda partoprenis la 48an Universalan Kongreson en Sofio. Post la Kongreso ili vizitis 13 landojn dum kvar monatoj, farante prelegojn, prezentante la artojn de aikido kaj ĵudo aŭ noan muzikon per fluto kaj planktamburo. Japanlingva verko de s-ro K. Deguĉi pri ĉi tiu vojaĝo *Rondvojaĝo en Esperantujo* estis eldonita ĉe la prestiĝa ĵurnalejo Asahi en eldonkvanto de 80 000 ekzempleroj kaj vekis sensacian intereson pri Esperanto.

Nun iom pri la eldona agado de Oomoto. Ni havas nian presejon nomatan "Tenseiŝa", kiu kapablas presi, ne nur japanlingvan eldonaĵon, sed ankaŭ Esperantan. Krom la periodaĵoj *Oomoto* kaj *Verda mondo*, jam fruatempe eldoniĝis *Kio estas Oomoto?*, *Fundamenta Kursolibro de Esperanto*, *Sinjoro laŭdata*. Ĉi tiu lasta estas kolekto de poemoj kaj frazoj, senditaj de diverslandaj gesamideanoj por gratuli la reliberiĝon de O. Deguĉi post sesjara akuziteco en 1927. Inter la kontribuantoj oni vidas multajn famajn nomojn (Leon Zamenhof, Ernst Kliemke, Teo Jung, H. Boucon ktp).

Post la Dua Mondmilito eldoniĝis *Filoj de Dio, adorantoj de Dio* – kolekto de fotoj pri la vivoj de Oomotanoj (1963, 284p.), *Intensiva kurso de Esperanto*, de T. Nakamura, *Kvinteto* (vortoj de Nao, Onisaburo, Sumiko, Hidemaru kaj Naohi, trad. de T. Nakamura), *Enciklopedieto japana* – riĉe ilustrita verko pri japanaj temoj: lingvaj, historiaj, literaturaj, kulturaj kaj sociaj, de T. Nakamura, *La libro de teo* de Kakuzo Okakura, esperantigita de T. Nakamura, *Utafesta poemaro* – kolekto de premiitaj poemoj kaj konkursaĵoj ĉe Oomoto-Internacia Festivalo. Ĉi tie, kie ofte aperis la nomo de T. Nakamura, redaktoro de *Oomoto*, mi notu, ke li en 1962 elektiĝis en la Akademion de Esperanto.

Oomoto-Internacia Festivalo, okazinta tuj post la 50a UK en Tokio, certe estis unu el la kulminoj de nia fortostreĉo. Partoprenita de 150 geesperantistoj el eksterlando, daŭrinta tri tagojn, ĝi estis neforgesebla travivaĵo ne nur al la gastoj sed ankaŭ ni japanoj.

En 1966 ni delegis du gejunulojn al la 51a UK en Budapeŝto kaj la tiujara TEJO-Kongreso, ebligante al ili viziti kelkajn landojn poste, kaj tio fariĝis la komenco de kutimo, kiu daŭras ĝis nun. En 1981 ni sendis karavanon de sep gejunuloj al la 66a UK en Brazilio.

En 1969 mi estis denove delegita al la 54a UK en Helsinki kune kun s-ro J. Umeda kaj du gejunuloj. La ĉefa motivo estis propono de IKUE, ke Oomoto aranĝu interreligian kunvenon en la kadro de la Kongreso. La unua Interreligia Kunveno Esperantista okazis kun partopreno de 150 anoj diversreligiaj. Mi ĝin prezidis; en amika atmosfero oni interŝanĝis opiniojn kaj ĉiuj unuanime konsentis daŭrigi la kunvenon en la postaj kongresoj kaj tiucele tuj formis Konstantan Komitaton. Post la Kongreso mi vojaĝis dum kvar monatoj vizitante 22 landojn (Israelo, Hinda Unio, Vjetnamio k.a.).

Danke notenda estas la helpo de esperantistoj al agado de Oomoto, kiam ĝi praktike utiligas Esperanton. En 1972, okazis la ekspozicio de artaj verkoj de Onisabu-



Apenaŭ iu eksterlanda esperantisto vizitas Japanion sen "pilgrimi" al la Oomoto-Centro en Kameoka: Baldur Ragnarsson (dua de dekstre) vizitis Oomoton en 1981.



Partoprenantoj de Oomoto – Internacia Festivalo en 1965 antaŭ la Esperanto-monumento en Kameoka

ro kaj lia skolo en la Muzeo Cernuschi en Parizo. Por sukcesigi la tie aranĝitan "Japanan Vesperon", parizaj esperantistoj dissendis cirkuleron kaj la salonon plenigis 300 vizitantoj. La fakto, ke sen speciala brua anonco venis tiel multaj personoj, estis miriga al la oficistoj de la Japana Ambasado kaj de la Muzeo. La sama ekspozicio tre sukcese okazis en la daŭro de tri jaroj en multaj grandaj urboj kiel Marsejlo, Londono, Roterdamo, Nov-Jorko k.a. Ĉie ni ĝuis similan kunlaboron de lokaj esperantistoj.

En 1973 estis la kvindekjara jubileo de Esperanto en Oomoto. Memore al tio ni invitis la 60an Japanan Esperanto-Kongreson al Kameoka. Ni tre ĝojis, ke ĝi havis 936 aliĝintojn (plej grandan nombron ĝis nun atingitan) kaj tridek gastojn el dek tri landoj, inter kiuj tripersona ĉina delegacio kaj s-roj W. Auld, W. Harmon kaj A.W. Rowe, kiuj prelegis. Sekvantan jaron, Ĉina Esperanto-Ligo kune kun Ĉina-Japana Amika Asocio oficiale invitis japanan esperantistan delegacion okpersonan, en kiu s-ro R. Tokuda kaj mi havis la honoron speciale menciiĝi. Du semajnoj da gastrestado donis al ni fortan impreson pri la nove leviĝanta Ĉinio kaj samtempe la esperon, ke ĝi certe faros plej efikan puŝon por la ĝenerala venko de Esperanto.

En 1975 okazis la unua Pacifika Esperanto-Kongreso en Melburno, al kiu Oomoto denove delegis min. Se Esperanto pretendas esti mondlingvo, ĝi ne devas esti fermita en Eŭropo aŭ en landoj de la blanka raso. La landoj ĉirkaŭantaj la Pacifikon ludos, aŭ devas ludi, gravan rolon en nia movado, movado de facile lernebla lingvo internacia. En 1983, lige kun la 60-jara jubileo de Esperanto en Oomoto, okazos la 70a Japana Esperanto-Kongreso denove en Kameoka. Ni faros ĉion eblan por bonvenigi la kongreson kaj gastojn.

Kursojn de diversaj longecoj (de unu semajno, dek tagoj ĝis tri aŭ ses monatoj, eĉ unu jaro) EPA okazigadis ne nur en la Centro en Kameoka, sed en diversaj lokoj tra la lando. Tridek aŭ kvardek kursojn ni okazigadis dum ĉiu jaro. Dum la pasintaj sesdek jaroj (pli ĝuste kvindek jaroj, ĉar mankas dek jaroj pro la persekutoj de la registaro) ni okazigis entute 1 500 ĝis 2 000 kursojn kun partopreno de pli-malpli 50 000 personoj. Tre bedaŭrinde estas ke nur malmultaj fariĝis aktivaj esperantistoj, parolkapablaj. Ĉu ĝenerala fenomeno de kursoj de Esperanto?

Dum la pasintaj sesdek jaroj – sufiĉe longa tempo – ni do faris sufiĉe multe, laŭ nia povo. Sed retrospektive kalkulante, ni trovas multon, kion ni devis, sed ne povis atingi. Tra la mondo disvastigi Oomoton per Esperanto kaj Esperanton per Oomoto ne nur en Japanujo! Kion ni atingis cele al la realigo de tiu deklaro de Onisaburo? Vere ni hontas. Ni donos fortan vipfrapon al ni por galopi. Jes, tiucele mi uzos la ĉarman vipon, kiun kiel memorajon donacis al ni ĝustatempe d-rino F. Szabó-Felső, kiam ŝi vizitis en la lasta somero la Oomoto-Centron kaj eĉ mian modestan teĉambreton.

Aliflanke, tamen, ni devas ĝoji kaj gratuli, ke la kvazaŭgeedzeca rilato de Oomoto kaj Esperanto ĉiam plifortiĝas en bona konkordo. Ili ame servadis unu al la alia eĉ en tre malfacila tempo de tondro kaj uragano. Kun tiu forĝita amo, helpante unu la alian reciproke, ili kuraĝe marŝu por la savo de la homaro, kiu staras ĉe la rando de pereiga abismo.

Mi estas samtempe oomotano kaj esperantisto. Kiel oomotano mi dediĉas profundan dankon al Esperanto kaj la esperantistaro pro la grandaj bonoj, kiujn ili donis kaj donas al Oomoto, dum kiel esperantisto, mi sentas agrablan devon esprimi sinceran dankon al Oomoto, kiu ĉiam restas fidela al Esperanto kaj kiu, se paroli pri mi persone, ja donis al mi Esperanton.

Eizo Itoo

68a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Budapeŝto (Hungario) 1983 07 30 – 08 06

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Loka Kongresa Komitato: La ĉefa organiza teamo, kiu preparas la 68an Universalan Kongreson de Esperanto, estas ĉi-foje aparte ampleksa kaj – almenaŭ unuavide – aparte elstara kaj kompetenta. Jen la nomoj kaj funkcioj: **d-ro Endre Baráth** (parlamentano, sekretario de la Kultura Komisiono de Hungara Parlamento, ĉefsekretario de Hungara E-Asocio, komitatano de UEA), prezidanto; **d-ro Imre Pethes** (ministeria sekcia estro, vicprezidanto de HEA, komitatano de UEA, prezidanto de MEM), vicprezidanto; **s-ro Márton Lengyel** (vicestro de Hungara Nacia Turisma Oficejo, prezidanto de la Budapeŝta Komitato de HEA), vicprezidanto; **d-ro Ottó Haszpra** (universitata profesoro, vicprezidanto de HEA, komitatano de UEA), rektoro de Internacia Kongresa Universitato; **s-ro Tibor Vaskó** (sekretario de HEA, komitatano de UEA), ĝenerala sekretario; **d-ro Vilmos Benczik** (ĉefredaktoro de *Hungara vivo*, komitatano de UEA), sekretario; **s-ino Erzsébet Pallós** (estrarano de HEA, vicprezidanto de Monda Turismo), sekretario. **S-ro István Mészáros** (oficisto de HEA) zorgos pri la kasista laboro; **d-ro István Szerdahelyi** (konata esperantologo kaj komitatano de HEA) direktos la Esperantologian Konferencon; pri informado kaj gazetara servo zorgos s-roj **András Sugár** (ĉefkunlaboranto de Hungara Televido) kaj **Imre Cserhalmi** (redakciano de la hungarlingva revuo *Világ és nyelv* / Mondo kaj lingvo). **S-ino Éva Farkas-Tatár** okupiĝos pri la artaj programoj, dum **s-ro Imre Szabó** (prezidanto de Hungara E-Junularo) gvidos la fakon de junularaj aranĝoj, kaj s-inoj **Margit Evva** kaj **Marianna Rieth** okupiĝos pri la loĝigo kaj ekskursoj. **S-ro Sándor Jakab** zorgos pri kulturaj servoj, kaj **s-ino Ada Csiszár** respondecos pri la dokumentado kaj giĉetoj; **s-ro Péter Rados** estros la kongresejon, dum **s-ino Zsuzsa Barcsay** okupiĝos pri la Infana Kongreseto kaj pedagogiaj aranĝoj. Kompreneble, ankaŭ **s-ro Diccon Masterman**, kiel kongresa respondeculo de UEA, estas membro de LKK. S-roj **István Keresztes** kaj **József Magyari** plenumos la revizoran taskon. Kvankam jam ĉi tiu listo aspektas ampleksa, ĝi tamen estas nur la ĉefa kerno de la organiza stabo por la 68a UK. Ĉar oni en Budapeŝto atendas plurmilan kongreson, oni bezonos tie dekojn kaj dekojn da kunhelpantoj. Oni ne dubas, ke la hungara ĉefurbo, kiu supozeble ne trovas konkurencon por la titolo de la plej vigla urbo en la Esperanto-movado, povas disponigi al la Kongreso la necesan nombron da kunlaborantoj.

Kongresa temo: Lige al la Monda Komunika Jaro 1983, la Estraro de UEA elektis jenan temon por la 68a UK: "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado". Laŭ la ĝisnunaj spertoj, Unuiĝintaj Nacioj (ties Ĝenerala Asembleo proklamis la Jaron) kaj Unesko ĉefe atentos la teknikajn aspektojn de la komunikado. Tial la budapeŝta kongresa temo celas esti la necesa komplemento al la pritrakto de la komunikaj problemoj de la hodiaŭa mondo.

Kvizo pri la historio de UEA: Dum la 68a UK oni planas revivigi la kvizon (publikan demandokonkurson), kiu jam okazis en la Kongresoj de antaŭ kelkaj jaroj. Ĉi-foje tiu eduka programo traktos nur unu temon – la 75-jaran historion de UEA. Por ke la nivelo de la konkurso estu kiel eble plej alta (kaj interesa), amataraj historiistoj faru jam nun la necesan studlaboron. Tiuj, kiuj volas kandidatiĝi por la konkurso, skribu baldaŭ al la konstanta adreso en Roterdamo.

Cseh-metoda kurso por komencantoj: Internacia Esperanto-Instituto, kiu de kelkaj jaroj denove okazigas en la Kongresoj seminariojn por Cseh-metodaj instruistoj, planas ion novan por Budapeŝto. Tie okazos du kursoj, laŭ la rekta metodo, por la komencantoj. Oni esperas varbi por tiuj kursoj ĉefe la familianojn, kiuj ne parolas Esperanton sed akompanas iun el la kongresanoj. Tiel oni provas solvi la demandon, kiel distri tiujn homojn, kiuj spertas lingvajn barojn en niaj Kongresoj. Kompreneble, okazos ankaŭ la kutimaj konversaciaj rondoj kaj progresiga kurso.

Loĝado: Budapeŝto allogas diversajn internaciajn kongresojn kaj grandan nombron da vizitantoj ĉiujare, kaj ĝi tial havas multajn hotelojn. LKK tamen konscias, ke amaso da kongresanoj preferos loĝi malmultekoste, pro kio oni zorgos pri kiel eble plej granda nombro da litoj en studentaj domoj kaj aliaj malmultekostaj tranoktejoj. En tiaj lokoj unu tranokto (en plurlita ĉambro) kun matenmanĝo kostas inter 100 kaj 300 forintojn (proksimume 7 ĝis 21 guldenoj). Kiel kutime, detaloj pri la loĝeblecoj kaj la koncernaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno de la Kongreso.

Infana Kongreseto: LKK planas paralele kun la 68a UK okazigi la 20an Internacian Infanan Kongreseton. Tiucele jam en la 19a Kongreseto en Antverpeno laboris tri hungaraj gvidantoj. Nun estas interkonsentite, ke s-ino Marie Grela el Belgio – ŝi estris la infanan kongreseton en Antverpeno – interŝanĝe iru al la budapeŝta infana aranĝo.

Statistiko: Ĝis la finredakto de ĉi tiu revunumero (komenco de decembro), la kongresa administracio jam registris ĉ.450 aliĝintojn al la 68a UK. Kiel kutime, la granda lavango de aliĝoj estas atendata jarfine, antaŭ ol la aliĝkotizoj altiĝos la 31an de decembro.

Laste aperis . . .

Elektitaj sonetoj, G.G. Belli (1791-1863). El la roma dialekto de la itala trad. Gaudenzio Pisoni. Reviz. Renato Corsetti. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1982. 65p. 21cm. Tre sukcesa provo redoni en Esperanto parton de la sonetaro de Belli, kiu strebis kvazaŭ senŝanĝe registri, sen ornamoj, sen ajnaj aliigoj la diraĵojn de la roma plebo. Tre flua kaj riĉa lingvaĵo. Prezo: 10,50 guldenoj.

Estona panoramo, kompilis Gunnar Paal. Tallinn: Perioodika, 198? 1982. 134p. Ilus. 19cm. Per multaj bildoj kun Esperantaj klarigoj ĝi prezentas la ĝeneralajn aspektojn de la nuntempa Estonio. Ĉapitro pri la estona E-movado. Prezo: 7,50 gld.

Lesseps: **Vivo de Lesseps**, A. da Silva. El la portugala trad. J. de Freitas Martins. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 19p. 21cm. Pri la konstruinto de Sueza Kanalo. Prezo: 1,20 gld.

Lumgaso, La, A. da Silva. El la portugala trad. J. de Freitas Martins. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 25p. Mimeo. 21cm. Kulturklerigaj kajeroj n-ro 12. Prezo: 1,20 gld.

Persa-Esperanta vortaro, B. Samimy. Kunlaboris M. Moŝkeri. Teherano: 1981. 14+736p. 25cm. Ĉirkaŭ 40 000 vortoj, idiomaĵoj kaj proverboj. Prezo: 60,00 gld.

Petrolo, La, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 20p. 21cm. Mimeo. Historio de la ekspluatado de unu el la ĉefaj energifontoj. Prezo: 1,20 gld.

Pinokjo (1881), C. Collodi (pseŭd., 1826-1890). El la itala trad. (1930) Mirza Marchesi. Verona: Itala Esperanto-Instituto, 1981 (represo). 150p. Ilus. 21cm. Unu el la plej famaj verkoj de la porinfana monda literaturo. Prezo: 16,20 gld.

Praktika Kurso de Esperanto, Bert de Wit. Vogelenzang: Bond van Arbeiders-Esperantisten F.L.E., 1982. 124p. Ilus. 21cm. Mimeo. 15-leciona koresponda kurso kun ekzercoj, por nederlandlingvanoj. Prezo: 9,00 guldenoj.

Senco de l' morto, La, Leo Polak (1880-1941). El la franca trad. F. Munniksma. Rødovre: Eldonejo Perspektivo, 1982 (ne indikita). 20p. Mimeo. 21cm. Prezo: 7,20 gld.

Suplementaro de "Fundamenta leksikono Esperanta"; Propraj nomoj, M. Hukuta (1912-). Tokio: Asake-Syoboo, 1981. 288p. 25cm. Listoj de nomoj propraj, landaj, urbaj, stelaraj ktp. en pluraj lingvoj (Esperanto, japana, ĉina, rusa, angla, franca, germana, pola, latva, hispana, itala, nederlanda, portugala, sveda). Ampleksa indekso. Prezo: 23,10 gld.

Timur kaj lia taĉmento, A. Gajdar. El la rusa trad. E.S. Pervertajlo kaj R. Grinŝpan. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 72p. 20cm. ISBN 963 571 079 8. Aventura romaneto kun milita temo, klasikaĵo en la soveta junulara literaturo. Prezo: 8,10 guldenoj.

Volapük die weltsprache (1880), Johann Martin Schleyer (1831-1912); **Volapük-bibliographie**, Reinhard Haupenthal. Hildesheim/Zürich/New York: Georg Olms Verlag, 1982. 136+ 124p. 17cm. ISBN 3 487 07278 5. Prezo: 57,00 gld.

Vortareto kun ekzemploj, Rihej Nomura. El la japana trad. Kim Pan-sul. Seulo: Korea Esperanto-Asocio, 1981. 215p. 15cm. Prezo: 12,60 guldenoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Speciala rabato ĝis la fino de januaro!

Okaze de Kristnasko kaj Novjaro, dum DECEMBRO KAJ JANUARO vi ricevos 5-procentan rabaton por ĉiu el la ĉisube menciitaj libroj. Rabato ekde unu ekzemplero! Pri la sendokostoj vidu nian anoncon sur la antaŭlasta kovrilo.

Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' profeto?: J. Elem. El la hungara trad. V. Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 91p. 20cm. Paralelaj tekstoj en la hungara kaj Esperanto. Aventuroj de turisma grupo kies veturilo paneis en dezerto. Prezo: 145 BF.

Esperanto snel assimileren: W.M.A. de Smet. Antwerpen: Uitgeverij De Nederlanden, 1982. 151p. 22cm. Rapida kurso en 15 lecionoj (kun ekzercoj) por nederlandlingvanoj. Prezo: 395 BF.

Espéranto: Une approche de la langue internationale. Paris: UFE, 1979. 60p. Ilustrita. 15cm. Konciza gramatiko, dudirekta vortareto, adresaro de francaj esperantistoj kaj aktualaj informoj pri la Movado. Prezo: 40 BF.

Historio de Esperanto: Léon Courtinat. Eldonis la aŭtoro, 1964-1966. Verko trivoluma, entute 1332p. 24cm. Ĝi prezentas dokumentojn (leterojn, biografiojn, bibliografiojn, fotojn, komentojn) pri la historio de la Esperantaj movado kaj literaturo. Temas pri tre utila kaj necesa verko, kiu traktas la tutan historion de 1887 ĝis 1960. Prezo (por ĉiuj tri volumoj kune): 500 BF.

Initiation théorique et pratique (1934): P. Denoël. Sonorilo, 1975 (5a eldono). 96p. Ilus. 22cm. Bind. Prezo: 180 BF.

Konsideroj (1974): Jo Haazen. 27p. 27cm. Publika letero pri la organizo kaj perspektivoj de la Esperanto-movado. Prezo: 100 BF.

Kristnaska triptiko: Felix Timmermans. El la nederl. tradukis E. Paesmans. Dua eldono, 1977. 48p. Ilus. 18cm. Prezo: 70 BF.

Leksikono: J.P. Bovy. Herstal, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. 4500 vortoj en Esp., franca, angla, germana kaj nederlanda. Prezo: 240 BF.

Moderna kroatia prozo. Red. I. Krtalić. El la kroata trad. R. Imbert. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1979. 606p. 21cm. Bindita. Antologia kolekto de 34 noveloj de same multaj verkistoj, de la komenco de la 20a jarcento ĝis la nuntempo. Prezo: 1055 BF.

Poezia bukedo por geknaboj de la mondo: Bertram Potts. Amo-Akademio, 1978. 102p. Ilus. 19cm. 49 versaĵoj. Prezo: 290 BF.

La verda raketo: J. Forge. Helsinki: Fondumo Eo, 1973. 145p. 18cm. Novelaro de la fama E-prozisto. Prezo: 140 BF.

Mendu rekte ĉe: Eldonejo kaj Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk (Antwerpen), Belgio. SONORILO estas la sola oficiala E-libroservo en Belgio (Belga ŝtatgazeto: 1962 07 05 – n-ro 3229). **FELIĈAN 1983! ! !**

Eldonejo-librejo SONORILO

TEJO-paĝo

Ĉi tiun rubrikon prizorgas: PAUL S. HOPKINS, 45 Mansion Street, Kitchener, Ontario, Kanado N2H 2J5.

39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO:

Kie kongresi en 83?

SE VI DEMANDUS, nun meze de decembro 1982, kie kaj kiam okazos la 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO – en 1984 –, ni povus doni al vi multe pli da firmaj kaj interkonsentitaj detaloj, ol ni povas fari pri la 39a IJK en 1983. Strange kaj nekutime, ke duonan jaron antaŭ ol la evento mem devus okazi – ie – ni povas liveri al vi nur supozojn kaj temojn de diversaj kontaktoj kaj traktadoj, kiuj okazas en la Estraro de TEJO kaj ĉirkaŭ ĝi. Ĉar ĉi tiu paĝo ja ne estas simpla afiŝtabulo de la Estraro de TEJO (same kiel la resto de la revuo ne servas tiucele al la Estraro de UEA), ni decidis ĉi-sube publikigi almenaŭ tiujn detalojn pri la venontjara junulara E-kongreso, kiuj al ni estas konataj kaj kiuj –parte – povus montriĝi ĝustaj. Ni, kompreneble ne intencas eniri la demandon, kiu(j) kulpas pro la ekestinta situacio. Nia emo estas plenigi la informovakuon, kiu tiel forte sentiĝas nun, kelkajn semajnojn antaŭ ol la unua aliĝperiodo (laŭ la Kongresa Regularo de TEJO) devus finiĝi.

Post kompleta paneo de la korespondaj rilatoj inter la Estraro de TEJO kaj Hungara Esperanto-Junularo, pri kies kandidateco por organizi la venontjaran IJK oni aŭdis – sufiĉe definitive – jam almenaŭ en Antverpeno kaj Loveno, la Estraro eĉ komencis sondi ĉe kelkaj aliaj landaj sekcioj de TEJO pri eblecoj kongresi ĉe ili en 1983. Tio ŝajne rapidigis la korespondadon kun Hungario, kie la preparoj estis kaj ankoraŭ restas en plena svingo. El diversaj leterkopioj ni kunrastis jenajn informojn pri la 39a IJK:

Ĝi okazos – plej verŝajne – en la hungara urbo Debrecen, ĉ. 200km oriente de Budapeŝto, kun ĉ. 200 000 loĝantoj. Estas planite, ke la kongreso komenciĝu la 22an aŭ 23an de julio, kaj daŭru ĝis la 29a aŭ 30a de julio 1983. Kiel kongresejo plej verŝajne servos la salonoj de la hotelo "Aranybika", en kiu ankaŭ loĝos ĉ. 300 gekongresanoj, laŭ aparte favoraj tarifoj. Pliaj 400 kongresanoj loĝus en mezlernejaj pensionoj, kaj aliaj 500 en studentaj domoj de Debrecen. Vi vidas, ke oni tie atendas tute grandan TEJO-kongreson kun ĉ. 1200 partoprenantoj.

Ekzistas ankaŭ buĝeto de tiu eventuala IJK en Hungario. Ĝi antaŭvidas proksimume la samajn prezojn (t.e. aliĝkotizojn) kiel estis ĉi-jare en Loveno. Tio signifas, ke la meza kotizo en la meza aliĝperiodo (inter januaro kaj aprilo) estos ĉ. 250 guldenoj. Kiel ĉiam ĉe IJK, la kotizo ja inkluzivas ne nur la kongresan programon sed ankaŭ la manĝojn kaj la tranoktadon. Restas ja la demando, kiel solvi la nun ekestintan problemon pro la kompleta manko de la unua (plej malmultekosta) aliĝperiodo. Se oni restos ĉe la tiurilata preskribo de la Kongresa Regularo de TEJO, apenaŭ eblos, ke iu ĝuu la plej favoran tarifon. Tamen, fine de decembro ĉi-jare, en la Centra Oficejo en Roterdamo kaj en la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, renkontiĝos pluraj estraranoj de TEJO. Verŝajne ili ĉefe diskutos ĝuste la demandojn ĉirkaŭ la venontjara IJK. Tio siavice signifas, ke ni eble jam en nia januara numero povos anonci la definitivigon de pluraj informoj, kiujn ni provizore anoncis en ĉi tiu teksto.

Kiel ĉiu fablo, ankaŭ tiu ĉi havas moralan mesaĝon, kiu devus teksti jene: Ne sufiĉas nur labori, necesas ankaŭ informi pri tiu laboro, precipe tiujn por kiuj oni laboras, kaj tio en nia kazo estas la estontaj partoprenantoj de la 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Kontakto
kun tekstoj por komencantoj

De jaroj jam, oni preskaŭ plore demandas pri publikigo de speciala revuo por komencantoj. Kiel ni anoncis en nia novembra numero (p. 183), ekde la komenco de 1983 tia revuo aperos, tia fariĝos – parte – la revuo de TEJO, "Kontakto". Estas jam tempo klare esprimiĝi favore al la novstila revuo, simple – per abono. Vidu pri tio la kotiztabelon en nia oktobra numero. La nova "Kontakto" ne atendos la finaperon de ĉiuj numeroj de la malnova "Kontakto" por 1982 sed provos dekomence prezentiĝi kiel akurata, freŝidea, facillingva periodaĵo por la novuloj en la Internacia Lingvo.

Ekde 1983 "Kontakto" estos nova revuo, por homoj junaj en la vivo kaj novaj en la Movado. Novaj kaj modernaj temoj per facila, klara lingvo. Pli ofte, pli da paĝoj – sed la prezo sama!

Nekrologoj

NORMAN R. SMITH (1923-1982) forpasis meze de novembro en la urbo Benin en Niĝerio, kie li vivis dum multaj jaroj kaj instruis en tieaj universitatoj. Origine brito, Smith antaŭe estis tre aktiva i.a. kiel sekretario de Londona Esperanto-Klubo, estrarano de Brita Esperanto-Asocio, komitatano (1957-1963) kaj estrarano (1960-1962) de UEA. Smith estis ankaŭ malavara apoganto de UEA kaj de multaj jaroj lia nomo staris — sola — en la kategorio Dumviva Membro-Subtenanto.

ALEXANDER W. THOMSON (1896-1982), honora membro de UEA (de post 1947) kaj fondinto (en 1918) de Skolta Esperanto-Ligo, forpasis la 8an de novembro en Welling (Britio), kie li estis delegito kaj fakdelegito de UEA. "Avoto", kiel li estis konata en la brita E-movado, lernis Esperanton jam en 1911. Lia *Rimvortaro Esperanta* aperis en 1918, kaj la poemkolekto *Gutaro* en 1979. Thomson prezidis Skoltan E-Ligon de ties fondiĝo ĝis 1936. Li aktivis dum multaj jardekoj en pluraj lokaj kaj regionaj E-organizaĵoj en Britio. En 1959 li verkis studon pri la geografiaj nomoj en Esperanto.

CARLOS H. DIONÍSIO (1908-1982) forpasis la 15an de oktobro en São Leopoldo (Brazilo), kie li fondis la lokan E-societon kaj funkciis kiel UEA-delegito. Li membris en UEA de post 1945 kaj i.a. estis sekretario de E-societo en Porto Alegre.

GEORGES R. BOULANGER (1909-1982), profesoro pri maŝinkonstruado, fondinto kaj prezidanto de Internacia Kibernetika Asocio, forpasis la 23an de aŭgusto en Namur (Belgio). Boulanger ekinteresiĝis pri Esperanto en 1978, tuj fariĝis vicprezidanto de Eŭropa Klubo, kaj en 1979 partoprenis Esperantan sciencan simpozion en Marília (Brazilo). Li havis grandajn meritojn pri la enkonduko de Esperanto kiel unu el la laborlingvoj de la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko en 1980 (vidu nian numeron de junio ĉi-jare) kaj pri ĝia utiligo ankaŭ en la 10a Kongreso, en aŭgusto 1983.

LUDWIG THALMAIER (1915-1982), katolika pastro kaj gimnazia instruisto, kiu kelkfoje diservis en Universalaj Kongresoj kaj aktivis en IKUE, forpasis antaŭ nelonge en Landshut (FR Germanio), kie li estis fakdelegito. Li membris en UEA dum pli ol 30 jaroj.

JOSEPH KRAEMER (1904-1982), delegito kaj fakdelegito de UEA forpasis antaŭ nelonge en Guebwiller (Francio).

ADRIAAN BREDDELS (1909-1982), multjara sekretario de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, mortis la 19an de novembro en Drachten (Nederlando). Breddels lernis Esperanton antaŭ la Dua Mondmilito kaj unue kunlaboris en SAT, poste en UEA (ankaŭ kiel delegito). Li estis tre elstara aktivulo en la Nederlanda E-movado kaj oni grandparte ŝuldas al li la reaktiviĝon de IEI dum la lastaj dek jaroj. Breddels estis kuniniciatinto de la nuna Esperanto-Centro en Hago. En 1964 Breddels estis vicprezidanto de LKK de la 49a UK en Hago.

JESÚS MAYNAR Y DUPLÁ (1894-1981) forpasis en Tenerife (Kanariaj Insuloj) pasintjare. Li estis doktoro pri natursciencoj, profesoro kaj poste rektoro de la Universitato en La Laguna. Li komencis lerni Esperanton en 1910, sed povis finstudi ĝin nur post 1963, en la kursoj de prof. J. Régulo Pérez en la Universitato de La Laguna. Fakte, Maynar y Duplá estis la ĉefa mentoro de la oficiala instruado de Esperanto en tiu universitato inter 1963 kaj 1981 (kiam la instruado ĉesis).

Loke

Japanio

• En Takatsuki, ĉe Osako, la 6an kaj 7an de novembro okazis nekutima ekspozicio, kies materialo kolektiĝis helpe de Esperanto. Pere de du membroj de la loka E-societo, s-inoj Yumiko Inoue kaj Tomiko Takeuchi, kiuj partoprenis la 67an UK en Antverpeno, stariĝis kontaktoj kun virinoj el 15 landoj. La celo estis kolekti materialon kaj informojn pri la lernejaj manĝoj en diversaj landoj. Post trimonata korespondado kaj ordigado de la ricevitaj informoj, eblis nun montri al la publiko (en la Civitana Halo de Takatsuki) interesan ekspozicion, kiu atentigis pri la praktika valoro de la Internacia Lingvo.

Afriko

• Japana Esperanto-Instituto donacis al UEA naŭ kompletojn (libro, plus du kasetoj) de la konata lernolibro de A. Pettyn, *Ĉu vi parolas Esperante?*, kiu antaŭe ekzistis sur gramofondiskoj. UEA decidis pludonaci tiun instrumaterialon al la plej aktivaj grupoj kaj unuopuloj en jenaj afrikaj landoj: Angolo, Benino, Kamerunio, Kongio, Maroko, Maŭricio, Reunio kaj Nigerio.

Hinda Unio

• En nia marta numero ĉi-jare aperis ampleksa raporto pri la unua kongreso de hindaj esperantistoj kaj fondiĝo de Federacio Esperanto de Bharato (FEB). Ni ne havis multajn novaĵojn el Hinda Unio intertempe, krom la surpiza – kaj bela – apero de la hinda pupteatro en la Kongreso en Antverpeno. Nun venas la unua numero de *Bulteno de FEB*, dumonata gazeto de la nova landa oraganizaĵo en tiu vasta sudazia lando. Kvankam la bulteno mencias, ke ĉi-jare okazis kelkaj E-kursoj kaj ke oni laboris pri novaj lerniloj de Esperanto en kelkaj hindaj lingvoj, pliajn novaĵojn ni povas atendi baldaŭ, ĉar por la komenco de decembro estas planita kunsido de la estraro de FEB.

Nederlando

• Antaŭ nelonge Frisa Esperantista Rondo donacis al UEA 500 ekzemplerojn de la bela, 92-paĝa romaneto *La dekopo de Afke* de N. van Hichtum (1860-1939). La Esperanta traduko de T. Brinkman aperis en 1974 dank' al la tiurilata testamento de la konata frislanda esperantistino Wies Steffering. La celo de la donaco estas distribui la libron senpage al la esperantistaro en la evolulandoj. Ĉar estas malfacile konsumi tiel grandan librokvanton en la malforta E-movado de tiuj landoj, UEA proponis al Ĉina Esperanto-Ligo akcepti 300 ekzemplerojn por siaj enlandaj bezonoj, kaj ĈEL akceptis la proponon. Tiel centoj da ĉinaj komencantoj konatiĝos kun la patrino Afke kaj ŝia infana dekopo en frisa vilaĝo fine de la pasinta jarcento.

Britio

• La 10an de oktobro ĉi-jare, en la Metodista Preĝejo en Hinde Street en Londono, okazis speciala diservo. Temis pri omaĝo al la 70-jara ekzisto de Londonaj Esperantaj Diservoj, kiuj okazas regule ĉiumonate jam sep jardekojn, komplete en Esperanto. La jubilean diservon ĉeestis pli ol 80 personoj; partoprenis ankaŭ la Londona Esperanta Ĥoro.

Svedio

• La libroklubo de Sveda Esperanto-Federacio, "Nova Libro" (pri kiu ni skribis en nia pasintjara decembra numero), baldaŭ resumos sian dujaran aktivecon. Ĝi montriĝas esti sukceso, ĉar en la klubo nun membras 70 personoj, kiuj ĉiujare ricevas 3 ĝis 5 librojn. La ĝis nun distribuitaj Esperantaj libroj venis el Brazilo, Ĉinio, Belgio, Italio, FR Germanio, Francio kaj Svedio.

Lingva problemo

• Antaŭ nelonge okazis enketo inter 2000 studentoj de la universitatoj en Augsburg kaj Trier (FR Germanio) kaj Helsinki kaj Turku (Finnlando). La enketo koncernis la lingvan problemon en Eŭropo kaj rilatis ankaŭ al Esperanto. Al la demando, ĉu Eŭropo bezonas komunan laborlingvon, 57,4% respondis jese. Pri la demando, kiu estu tiu lingvo, la respondoj estis jenaj: 81,43% la angla, 4,68% la franca, 4,50% Esperanto, 4,38% la germana. 88% de la enketitoj respondis jese al la demando, ĉu ili scias, kio estas Esperanto, kaj 10,23% opinias, ke Esperanto havas ŝancojn fariĝi komuna laborlingvo de Eŭropo. Plej favoraj al Esperanto montriĝis la studentoj de Turku.

Arbarkulturo

• En Germana Demokratia Respubliko oni faras preparojn por fondi esperantistan fakgrupon pri la mastrumado de arbaroj kaj forstoscienco. La celo estas ekapliki la Internacian Lingvon sur tiu faka kampo kaj ellabori Esperantan fakterminaron. Pliaj informoj ĉe: d-ro Karl-Hermann Simon, C.v. Ossietzkystr. 21, DDR-1300 Eberswalde-Finow, Germana DR.

Ekologio

• Tutmonda Unio por Vivprotektado, kun sidejo en Aŭstrio (Postfach 6, A-5033 Salzburg), decidis ekuzi ankaŭ Esperanton en siaj internaciaj rilatoj. Temas pri internacia organizaĵo "por la protekto de la naturo, pejzaĝo, animala kaj homa vivo". Ĝi havas filiojn kaj reprezentantojn en 27 eŭropaj, aziaj kaj amerikaj landoj.

Labortendaroj

• Kiel en kelkaj antaŭaj jaroj, Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (Jugoslavio) organizis dum 1982 plurajn Esperanto-kursojn en junularaj labortendaroj tra la lando. Okazis 13 kursoj kun 450 partoprenantoj. Ili ne ĉiuj ellernis la lingvon sed almenaŭ bone informiĝis pri ĝi kaj pri la Esperanto-movado. Preskaŭ ĉiu kursano aĉetis lernolibron de Esperanto.

Libroj

• En Moskvo, ĉe la eldonejo "Ruskij Jazyk" (Rusa Lingvo), ĵus aperis la dua eldono de *Esperanta-rusa vortaro* (1974) de E.A. Bokarev (1904-1971). Diference de la unua eldono,

Fake

Memorlibroj

• Bulgara Esperantista Asocio eldonos memorlibron pri la pasintjare mortinta Atanas D. Atanasov (1892-1981), konata esperantologo kaj multjara vicprezidanto de la Akademio. La nova libro, kiun prizorgas aparta redakcia komitato (kun prof. d-ro Stojan Ĝuĝev kiel gvidanto), enhavos lingvajn studojn de Atanasov kaj rememorojn aŭ aliajn kontribuaĵojn de tiuj, kiuj konis Atanasov kaj kunlaboris kun li. BEA petas, ke oni sendu tiajn tekstojn al: s-ino Antoaneta A. Atanasova, Vl. Poptomov n-ro 48, BG-1000 Sofia, Bulgario. Kiel konate, ĉe UEA troviĝas (jam kompostita) la esearo de Atanasov, *La lingva esenco de Esperanto*, kaj oni atendas ĝian eldonon – ĉi-foje definitive – en la unuaj monatoj de 1983. La tekstoj tie aperontaj ne eniros la memorlibron.

Ĝemelaj urboj

• Ĝemeliĝo de diverslandaj urboj estas ofta formo de internacia kunlaboro. La esperantistoj de Leverkusen en FR Germanio (Esperanto-Rondo, Postfach 1472, D-5093 Burscheid) estas verŝajne inter tiuj malmultaj, kiuj utiligas ĉi tiun okazon por regule kontakti la E-grupojn en la ĝemelaj urboj: Brackwell (Britio), Ljubljana (Jugoslavio), Nazareth-Illit (Israelo) kaj Oulu (Finnlando). Tiuj E-kluboj regule interŝanĝas informojn kaj grupleterojn kaj volonte legus pri aliaj spertoj sur ĉi tiu kampo.

Informado

• En la lastaj du monatoj, almenaŭ deko da gazetoj en Brazilo aperigis artikolojn pri Esperanto. Kelkaj el tiuj artikoloj estis escepte ampleksaj, kaj ĉiuj estis favoraj.

kiu aperis en 40 000 ekzempleroj, la eldonkvanto de la nova libro estas 100 000 ekzempleroj. Tamen, ŝajnas ke la libro tiel rapide disvendiĝis, ke la Libroservo de UEA ankoraŭ ne sukcesas akiri la bezonatan stokon.

Tradukoj

• Plia Esperanta verko de Edmond Privat (vidu ankaŭ nian novembran numeron) aperis en nacilingva traduko. Temas pri *Vivo de Gandhi* (J. Régulo, 1967), kiu nun eldoniĝis anglalingve kiel *The Life of Gandhi* en la traduko de Dorothy Threlfall. La traduko aperis en majo ĉi-jare ĉe la aŭstralia eldonejo Artlook Books.

Teatro

• Post la sukceso de la ĉi-jara Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj (vidu nian majan numeron), Hungara Esperanto-Asocio planas samspecan aranĝon ankaŭ en 1983. Ĝi okazos en Budapeŝto de la 18a ĝis la 27a de marto. Pliaj informoj ĉe HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.



Dai Song-en

• Kiel ni jam aludis pli frue en ĉi tiu revuo, de post la Kongreso en Antverpeno la Centra Oficejo de UEA havas ĉinan kunlaboranton. Temas pri s-ro Dai Song-en, 38-jara, kiu kunlaboris en kelkaj niaj lastatempaj numeroj. Li lernis Esperanton en Ŝanhajo en 1964, poste translokiĝis al la ĉina ĉefurbo kaj laboris kiel parolisto en la Esperantaj elsendoj de Radio Pekino de 1966 ĝis 1981, kiam li posteniĝis ĉe Ĉina Esperanto-Ligo. Li restos en Roterdamo ĝis la venontjara UK en Budapeŝto. La celo de lia restado estas spertiĝi ĉefe pri la kongresa organizado, ĉar, kiel konate, ĈEL interesiĝas pri la organizo de Universala Kongreso de Esperanto en Pekino.

Persone

Sutton

• Geoffrey Sutton, brita esperantisto, kiu antaŭe laboris en la CO de UEA kaj ĵus pasigis jaron laborante en la redakcio de *El popola Ĉinio* en Pekino, nun restadas en Japanio. Li venis tien meze de oktobro kaj restos plurajn monatojn aktivante por la japana Esperanto-movado. Laŭ la planoj pri kiuj ni informiĝis, Sutton en Japanio unuavice instruos Esperanton en diversaj lokoj kaj helpos kelkajn eldonprojektojn de Esperanto-Centro en Nagojo.

ESPERANTO

IN THE MODERN WORLD
EN LA MODERNA MONDO

Studies and articles on language problems,
the Right to Communicate,
and the International Language.

Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj
la Rajto je Komunikado,
kaj la Internacia Lingvo.

1959-1982

esperanto press

Jen la longe bezonata impona Angla/Esperanta informlibro kun kontribuoj de multaj konataj aktivuloj jam en dua reviziita pli ampleksa kaj firme bindita eldono kun detalaj indeksoj.
La libro celas

1. prezenti kiel lingvaj problemoj evoluis kaj kiun efikon ili havas en la moderna mondo;
2. ebligi al homoj, kiuj kapablas legi la Anglan, juĝi la ecojn de la Internacia Lingvo kaj legi Esperantajn tekstojn;
3. montri per dulingvaj artikoloj la literaturajn kvalitojn de nia lingvo kaj malkaŝi per represoj el libroj kaj periodaĵoj ĝian nunan praktikan uzadon en la plej diversaj kampoj;
4. pruvi, ke Esperanto povus solvi kaj internaciajn kaj naciajn lingvajn problemojn.

En la libro estas - ofte dulingve sur apudaj paĝoj - represitaj 8 Esperantaj kaj 15 Anglaj CED-dokumentoj. Sed ankaŭ multaj aliaj speciale por ĉi tiu libro verkitaj aŭ tradukitaj artikoloj enestas. Kaj duagradaj lernantoj kaj lingvistikaj studantoj trovos en ĝi sciindaĵojn. La 600-paĝa verko, 21 cm, 110 ilustraĵoj, troviĝu en ĉiu biblioteko, kiu posedas Anglajn konsult-librojn.
Vendu ĝin al du bibliotekoj kaj ricevu la vian senkoste! Mendu ĉe Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0 (afrankita prezo: Kan. $32,00 aŭ US$27,00) aŭ per pago al la poŝtĝirkonto 1173 68-306 en Hannover, Germanio de R. Eichholz, Bailieboro, Ontario (GM 64,00). Rabatoj: 3-9 ekz. 33%; 10-99 ekz. 40%; 100 kaj pli da ekz. 50%.

Oficiala informilo

N-ro 558

RENTO JE FIKSDATAJ DEPONOJ

La rento pagata pro fiksdataj deponoj (ŝparkontoj) ĉe UEA malaltiĝos de 7% al 6% jare ekde la 1-a de januaro 1983. La nova procentaĵo validos por ĉiuj novaj deponoj ekde tiu dato. Malnovaj deponoj ricevas ankoraŭ 7% ĝis la fino de sia deponjaro. Poste ili aŭtomate renoviĝas je la nova procentaĵo, se la deponinto ne antaŭe petis repagon.

La sumo de ĉiuj ŝpardeponoj ĉe UEA jam superis kvaronmilionon da guldenoj. Se ankaŭ vi interesiĝas pri tiu ŝparformo, petu informilon ĉe la Centra Oficejo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Norvegio: Frode Reiersøl

DONACOJ 1982 (Gld.) ĝis la 30a de novembro

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Termaat 200,00. Sumo ĉi-jara 12 041,20.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Britio: Anny Lawson 48,00. Nederlando: L. Adelaar 48,00. Svedio: B. Bengtsson 48,00. Diversaj malgrandaj 6,56. Sumo ĉi-jara 3 762,47.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: Anonima 25,00. Sumo ĉi-jara 272,70.

FONDAĴO KER DE TEJO: Eŭropa Konsilantaro 5 041,89. Sumo ĉi-jara 24 377,84.

ĜENERALA KASO: Belgio: G. Wolff 2 500,00. Finnlando: L. Oterma 48,00. FR Germanio: M. Gründler 54,49; E. Herlitze 21,80; K. Simon 10,87. Nederlando: W. Akkerman 68,00; Ges-roj Rodenhuis 96,00. Svedio: L. Holmlund 48,00. Diversaj malgrandaj 1,00. Sumo ĉijara 5 088,28.

NOV-JORKA OFICEJO: **Patronoj** (minimume $100): Aŭstralio: Ydys Einihovici. Kanado: Bruce R. Crisp; Dorothy M. Hawley. Svislando: Dante Bertolini. FR Germanio: Werner Heinrich. Japanio: Oomoto. Usono: Julie M. Dinnel; Thomas A. Goldman; Rochelle F. Grossman; Ralph A. Lewin. **Subtenantoj** (minimume $25): Aŭstralio: Ilija Grahovac; Jean A. Lehane; Marjorie Ellyard. Brazilo: Luiz Mario Santos da Silva. Japanio: Mitunobu Sinoda; Syuiti Yamakawa. Usono: Aimée L. Pyott; Hobart K. Ver Ploeg; Joan Gildemeister; Spokane Esperanto Club; Scott S. Smith. **Amikoj** (minimume $10): Aŭstralio: Norman Collier. Belgio: F. Hoefefkens. Kanado: Alma More; Joseph Lejderman. FR Germanio: Christie Spruch; Friedrich B. Hilpert. Britio: Joy Gomèche; N. Durham. Italio: Clelia Conterno Guglielminetti. Irlando: M. Mullarney. Japanio: Motomu Kômoto; Hitosi Kuriyama; Keinosuke Murata; Hideo Ohara; Osamu Itosima; Sadami Tanaka. Korea Resp.: Sung Ho Cho. Norvegio: Louise Bøe; Pepita de Caspary. Nederlando: Robert Moerbeek. Svedio: Eugen Rytenberg. Usono: Carl Schmidt; Jeannette Gevov; John A. Mathews; Jackie McAloon; Marie G. Zimmermann; Margaret G. Hagler; Rosamond Brenner. Jugoslavio: Neven Kovačić.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de la anoncetoj.

Internacia Turisma Semajno en Cannes, fine de junio 1983. Informilo ĉe: s-ro Llorens, "Les Hortensias 2", Domaine des Fleurs 121 bis, blvd. Napoléon III, F-06200 Nice, aŭ ĉe: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Ŝpinlaboristo, 27-jara, serĉas korespondantojn, se eble samprofesiajn (sed ankaŭ aliaj estas bonvenaj): s-ro Gao Wei, Xibei Fangzhi Gongxueyuan Fushu Gongchang, Xi'an, Shanxi, Ĉinio.

En la nª tago de la jaro 1983, 1 Stelo egalvaloras al

$$(1{,}85 + \frac{n-1}{365})\,\frac{k}{v}$$

unuoj de valuto V, se la mezaj laŭbankaj kurzoj (en via lando) de la sveda krono kaj la valuto V estas respektive k kaj v. (W.P. Roelofs, kasisto de Universala Ligo)

Kiel diri? (Lentaigne). Mimeo. 5 000 zamenhofaj esprimoj pri 67 temoj. "Vera trezoro!" 9 gld. ĉe UEA. Nepre havinda.

27-jara geometro, komencanto, deziras korespondi pri sciencfikcia literaturo, vojaĝoj kaj lingvoj: s-ro Li Ching-yi, Shanxishan Cehuiju Hangcedui, Xi'an, Shanxi, Ĉinio.

Antaŭdankon
por la frua pago
de via kotizo
por la jaro 1983

INDEKSO

Revuo *Esperanto*
75a jarkolekto
numeroj 913–924

Administrado 83, 163
Afriko 45, 64, 125, 213
Akademio 154, 185
Albault, A. 185
Allan, J.T. 197
Apine-Grundsteins, E. 17
Arbarkulturo 214
Argentino 97
Ariste, P. 197
Auld, W. 13, 71, 117, 151, 155
Aŭkcio 48, 65
Aŭstralio 18, 38, 57, 77
Aŭstrio 116, 165
Aŭtomatigo 84, 201
Azzi, G. 162
Bakin 22, 78
Bakker, H. 125
Balano, J. (pseŭd.) 191
Balbin, J. 132
Barcsay, Zs. 130, 153
Bartelmes, N. 78
Baur, A. 118
Beaucaire, L. 73
Behrmann, H. 130, 153
Behrmann, W. 197
Belartaj konkursoj 13, 155, 166, 177
Belgio 16, 28, 137, 141, 156, 203
Benczik, V. 13, 53
Benink, G.H. 136
Berggreen, J. 136
Bernard, R. 131
Bertin, A. 198
Bertin, C. 138
Bertolini, D. 199
Berveling, G. 113, 133, 172
Bhave, V. 197
Bibliografio 15, 35, 55, 75, 114, 135, 173, 194, 211
Boniol, S. 155
Bormann, A. 162
Bormann, W. 163
Boulanger, G.R. 213
Bourgois, L. 54
Bovendeerd, J. 203
Brazilo 57, 129, 137, 214
Breddels, A. 213
Brennan, A. 5, 19, 183
Britio 26, 57, 107, 214
Broczkó, P. 107
Budhismo 177
Bulgario 17, 63, 176, 187, 214
Buller, O. 48
Cao, V.L. 37
Cappa, G. 13
Carr, T.R. 155
Casey, A. 12
Centjara Jubileo 25, 77, 82, 105, 123
Chaves, S. 191
Chicot, E. 38, 65
Childs-Mee, A.C.E. 66
Cool, J. 11
Coppens, C.J. 137
Corréa, E.D. 136
Corsetti, R. 22, 34, 43, 112
Csiszár, E. 169
Cunha, C.A.S. da 38
Ĉeĥoslovakio 2, 18, 37, 77, 198, 206
Ĉilio 176
Ĉinio 22, 24, 77, 97, 106, 117, 126, 138, 198, 204
Dahlenburg. T. 54
Dai Song-en 22, 157, 185, 204, 215
Danielsson, B. 155
Danlando 198
Darbellay, C. 171
Daŝgupto, P. 47, 167, 171, 191
David-Rousset, M. 136
Dawson, A. 159
De Diego, F. 193
De Smet, W. 9
De' Giorgi, A. 171
Delforge, M. 199
Denaskaj E-parolantoj 130, 169
Despiney, B. 36
Diĉeva, M. 187
Dimo, J. 118
Dionisio, C.H. 213
Diplomatio 142
Dobre, M. 202
Dominte, C. 72
Dresen, H. 197
Ebura Bordo 97
Edukado 90, 121
Egami, F. 19, 176
Eichholz, R. 12
Eklund, O. 197
Ekologio 214
Eksteraj rilatoj 2, 36, 88, 115, 134, 165, 175
Ekzamenoj 62
Eldona agado 62
Eldonaĵoj:
Apliko de Eo en scienco... 131
Apologio (Tertul.) 172
Apologio de Sokrato 34
Aventuroj de pioniro 199
Aventuroj de ŝpar= kaj ... 172
Baladoj el Asante 10
Boule de suif 193
Brazilaj geogr. nomoj 71
Ĉu ŝi mortu tra-fike? 191
Divershumore 171
Dudek kvin jaroj 13
E-movado en Uppsala, La 132
El subaj fontoj 110
Elektitaj satiroj 112
Esperanto 86
Esperanto: The Solution ... 12
Estis pli bona tempo 191
Etnismo 198
Fabeloj de la verda pigo 73
Gastejestrino, La 131
Geodezia fakterminaro ... 132
Germana ĵurnalisto komentas 110
Hajka antologio 72
Historiaj radikoj de nealianciĝo 34
Ho ve, miaj ŝuoj! 72
Infana raso, La 117
Infanpsikologio 74
Israelo kantas 192
Juda saĝo 111
Kantu kaj lernu 191
Karnavale 190
Kiu estas kiu ... 171
Klasika periodo, La 10
Komputado 172
Konduto de grandsinjoro ..., La 113
Kontakto 183
Korvo, La 10
Krabo kun oraj pinĉiloj, La 193
Litomiŝla tombejo, La 68
Londono vokas 132
LPLP 18, 94
Luzidoj, La 6
Makedona antologio 192
Makedonaj popolaj rakontoj 72
Malvasta kaĝo 14
Meze de Eŭropo 34
Misio sen alveno 191
Monda ekonomio 56
Neĝa infano 133
Nudpieda Gen 113
Pesi elefanton 133
Planlingvistiko 78
Plurnacia bukedo 190
Por la makedona lingvo 192
Pretertempe 171
Pri Jugoslavio 34
Prometeo ligita 111
Proverbaro franca-Esperanta 54
Provo de gram. de novjuda ... 190
Rakontoj de Canterbury, Prologo 11
Rakontoj el unua poŝo ... 73
Regulus 110
San Diego vokas 12
Scienca revuo 58
Sekso kaj egaleco 18
Sentimulo, La 194
Skiza historio de la utao 35
Skizo pri Ĉinio 34
Sociologio, ĝia historio ... 11
Sonetoj, La 71
Taschenlehrbuch Esperanto 54
TEJO tutmonde 196
Tiel okazis ... kaj aliaj rakontoj 133
Tito 34
Tra dezerto kaj praarbaro 132
Tundro ĝemas, La 14
Tutmonda sonoro 53
Vibraj momentoj 74

Vjetnama SR 34
Vojaĝo al Faremido 13
Vojaĝo al Kazohinio 199
Warum Esperanto? 12
Elektoj 161
Enketoj 185, 214
Epstein, F. 37
Eroŝenko, V. 14
Esperantologio 58, 167
Estrara Raporto 83, 152
Evolulandoj 25, 64, 122, 125, 213
Faka agado 18, 63, 70, 93, 101, 104, 107, 121, 122, 207, 214
Fejér, Z. 155
Fervojistoj 108
Financo 84, 95, 155, 170
Flanjak, I. 136
Forster, P.G. 11
Francio 2, 58, 66, 116
Francis, J.I. 191
Frank, H. 101, 167
Gadd, E. 136
Generaciaj aspektoj 30, 147, 148, 149
Germana DR 5, 214
Germanio FR 38, 97, 105, 214
Gjivoje, M. 127
Goeij, J.Th. de 136
Golden, B. 12, 64, 128, 155
Gonin, H. 193
Goodheir, A. 10, 34, 111
Gregor, D.B. 172
Grésillon 66
Haase, M. 36, 76, 115, 155, 192
Hansen, K. 136
Harry, R. 77
Haszpra, O. 121
Head, W.T. 136
Hermanns, P. 197
Heugten, W.A.M. van 54
Hinda Unio 17, 41, 214
Hispanio 18, 78, 97
Holzhaus, A. 176, 190
Homaj loĝlokoj 175
Hopkins, P.S. 134, 196
Høg, E. 117
Hungario 18, 81, 107, 108, 115, 169, 175, 215
Imbert, R. 194
Infankongreseto 157
Informado 26, 38, 77, 87, 97, 107, 137, 138, 186, 198, 205, 206, 214
Institucio Hodler 85
Instruado 49, 58, 153, 187
Instruistoj 18, 22, 98, 117
Interlingvistiko 19, 98, 117, 177, 197
Irano 176
Islando 17, 57
Italio 58, 137
Itoo, E. 207
Itô, K. 117
Izumi, Y. 113
Japanio 18, 77, 109, 116, 161, 167, 168, 181, 207, 213
Jelinková, E. 155
Johnson, W.B. 11
Jong, R. de 171
Jordan, D.K. 191
Jordanio 77
Jordanov, J. 187
Jugoslavio 4, 17, 37, 38, 57, 77, 184, 214
Jung, T. 199
Junulargastejoj 56
Kadrokursoj 203
Kalendaro 50, 188
Kalocsay, K. 53
Kanado 37, 97, 166, 198
Karlsson, L.G. 111
Kawasaki, N. 178
Kayser, O. 136
Kemiistoj 122
Kenjo 45
Kibernetiko 101
Kielpińska, L. 197
Kikusima, K. 109
King, M. 197
Klement, J. 206
Knichal, O. 155, 178
Knoedt, L.H. 6, 10, 71, 110, 171, 193
Kolker, B. 14, 122
Komencantoj 183
Kommon, L.J.Th. 136
Komputistoj 107
Komunikado 65, 143
Komunikado, Monda Jaro de 1, 61, 206
Kongresoj:
UK 66a, Brazilio 86
UK 67a, Antverpeno 9, 29, 70, 141–157, 160, 185
UK 68a, Budapeŝto 63, 189, 210
IJK 38a, Loveno 16, 56, 76, 158
Kongresoj aliaj:
Blindula 157
Fervojista 108
Infana 157
Korea Resp. 168
Kotizoj 179
Kraemer, J. 213
Krikke, W. 14
Kulturo 90, 155
Kursoj 57, 97, 197
Kursoj korespondaj 37, 198
Kuvajto 116
Laade, M. 197
Laborplanoj 43, 83, 163
Labortendaroj 76, 214
Landa agado 22, 41, 92, 109, 161 181, 203
Landheer, H. 18
Landmark, M. 74
Laoso 17
Lapenna, E. 165
Lapenna, I. 77, 105
Lelievre, P. 187
Leon-Smith, G. 182
Lernolibroj 57, 98
Lewis, E. 37
Li Unsang 176
Libroj 33, 214
Liebig, P. 54
Lindeberg, B. 72
Lingva problemo 3, 98, 143, 165, 201, 214
Lingvo 128, 165, 185
Lins, U. 34, 110, 132, 138
Llech-Walter 78
Lloancy, R. 11, 74
Lorjak (pseŭd.) 110
Mabesoone, J.M. 71, 132
Madagaskaro 77
Maertens, G. 1, 77
Maitzen, H.M. 165
Malto 38
Manuskriptoj 32
Manusu, R. 17
Masmoudi, M. 143
Masterman, D. 185
Maul, S. 30, 110
Maxwell, D. 167
Maynar y Duplá, J. 213
Membrostatistiko 39, 46, 84
Migliorini, E. 58
Milojević, S. 41, 62, 156, 161, 181
Minkov, S. 197
Minnaja, C. 131
Miyamoto, M. 14, 35, 72
Moritz, U.J. 198
Mosonyi, J. 38
Movado 1, 5, 21, 30, 43, 47, 105, 161, 181, 202, 203

Bindilo aŭ Jarkolekto

Ni povas indeksi por vi la jarkolekton, sed la indekso tamen ne diros al vi, kie troviĝas la bezonata revunumero. Ion oni devas fari tiurilate! Ne eblas simple tiel lasi unuopajn revunumerojn treniĝi tra la bretoj, tirkestoj, ĉambroj kaj jaroj. Jen du ideoj por solvi la problemon radikale:

Bele bindita jarkolekto kostas nun 33,00 (por Nederlando 34,32) gld., plus afranko. Atentu, ni bindas nur tridek jarkolektojn kaj la plimulto estas jam antaŭvendita.

Bela bindilo el kvazaŭleda plasto, por teni en perfekta ordo la numerojn de la aktuala jaro. Prezo: 9,00 (por Nederlando 10,62) gld., plus afranko. Triona rabato ekde 3 ekz.

EL KELKAJ
MILOJ
RESTAS
NUR KELKAJ
CENTOJ!

Malgraŭ la alta prezo, nun pli ol 2 300 esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurisu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lastaj centoj de la posedontoj!

esperanto en perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

Muller, R. 58
Muzikistoj 58
Muziko 150
Nederlando 26, 157, 197, 214
Neergaard, P. 58
Nelson, W.C. 197
Nervi, M. 10, 72, 74, 111
Neŭtraleco 1
Neves, R. das 17
Nguyen van Kinh 136
Nigerio 137
Nikaragvo 116
Nikolov, N. 63
Nordenstorm, L.G. 158, 191, 193
Norvegio 18
Nov-Zelando 176
Oficiala informilo 19, 40, 59, 78, 99, 118, 139, 178, 199, 216
Oka, H. 176
Oomoto 207
Oriento-Okcidento, Serio 6
Pakistano 17, 137
Pančev, M. 49
Pandiŝo 204
Parlamenta agado 129, 182
Perrenoud, N. 136
Phillips, S. 155
Pič, K. 68
Pilger, W.F. 198
Piron, C. 191
Planado 5, 163
Pliaĝuloj 30, 147, 165
Podkaminer, S.N. 197
Poliŝĉuk, P. 37
Pollando 198
Power, C.R.L. 13, 19, 32, 113
Psikologio 205
Pupteatro 4, 184
Radio 40, 80, 98, 120, 198, 199, 220
Ragnarsson, B. 208
Rasmussen, H.V. 37
Regiona agado 92, 187
Reunio 187
Rezolucioj 146, 149, 154, 159
Régulo Pérez, J. 68
Ritterspach, G. 108
Rohden, H. 17
Ronald, U.P. 166
Roover, R. de 172
Rosbach, J.H. 74, 155
Rossetti, R. 162
Rumanio 202
Saha (Sakaria), H. 17
Sakaguchi, A. 19
Saletti, N. 175
Sarafov, I. 136
Schoultz, I. 148
Schubert, K. 72, 110, 172, 192, 194
Scienco 101
Sekelj, T. 25, 118, 122
Sevak, G. 37
Simonnet, F. 178
Skoltoj 18, 166
Sly, S. 107
Smith, N.R. 213
Souza, D.P. de 71
Soveta Unio 57, 116, 122, 176, 197, 214
Sporto 18, 78, 198
Srilanko 116
Stefanovič, P. 10
Sumber, I. (pseŭd.) 111, 133
Sutton, G. 24, 106, 126, 171, 190, 215
Svedio 18, 97, 98, 214
Sygnarski, M. 132
Symoens, E. 28
Szabó, A. 13
Szerdahelyi, I. 98
Štimec, S. 4, 184
Ŝulco, R. 10, 34
Tajlando 17
Takač, Ž. 176
Tammelo, I. 136
Tanejev, S.I. 117
Tarrant, I. 45
Tavčar, M. 137
Tárkony, L. 13
Teatro 38, 81, 151, 215
TEJO 16, 21, 36, 56, 76, 91, 115, 134, 168, 175, 196, 212
Terminaroj 18, 138
Thalmaier, L. 213
Thomson, A.W. 213
Tonkin, H. 61, 147
Tradukado 201
Tradukoj 117, 177, 199, 215
Turismo 2, 57, 154, 198
Tyblewski, T. 98
UEA:
  Estraro 5, 62, 154
  Komitato 154, 161
Ueyama, M. 72
Ujeki, Ŝ. 113
Ullman, P. 6
Umeda, Y. 167
UN 25, 88, 143, 165
Unesko 2, 25, 65, 88, 143
Universitatoj 22, 117, 121, 198
Urbanová, E. 110
Usono 3, 137, 177, 198
Valano, J. (pseŭd.) 191
Varga-Haszonits, Zs. 98
Veen, J.S. 155
Venezuelo 38
Ventura i Freixas, J. 17
Verloren v. Themaat, W.A. 117
Vetter, R. 12, 131, 172
Vinař, V. 137
Virinoj 18, 98, 177
Vjetnamio 17, 177
Volontula servo 77, 83
Vondroušek, J. 73
Vortaroj 18, 214
Walmsley, G.E. 136
Wandel, A. 134
Waringhien, G. 10, 53
Welger, H. 205
Wells, J.C. 150
Wijngaarden, S. van 178
Wit, B. de 54, 74
Wood, R.E. 199
Xu Daorong 35
Young, K.J. 137
Zamenhof, L.L. 190
Ziegler, G. 112
Železný, I. 73



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendohoroj laŭ la Grenviĉa Meza Tempo (GMT). Mallongigoj: I (informoj), P (parolado), K (kurso).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz). I.P.
11.00-11.30 Pekino, 41.01m (7315 kHz), 30.42m (9860 kHz). I.P. Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.78m (15165 kHz). I.P.
16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz). I.P.
21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
22.30-23.00 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz). I.P.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 24.97m (12015 kHz), 13.95m (21500 kHz). I.P. Radio Wien (ORF), Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
22.00-22.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.
18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.
20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

06.10-06.25 Vatikano, 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

VENDREDE

15.55-16.00 Vieno, 89.8 MHz (M.F.). I.

SABATE

16.45-16.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 19.28m (15560 kHz). I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma, Esperanto, C.P. 230, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.
20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendon en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 7315 kaj 9860 kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15165 kHz al Sudorienta Azio; 7470, 9365 kaj 9965 kHz al Eŭropo; 9860 kaj 11515 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6210, 9645, 11740 kHz al Ameriko; **Vieno**: 12015 kHz al Nordorienta Ameriko; 15560 kHz al Proksima Oriento; 17745 kHz al Aŭstralio kaj Azio.
b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo.**
c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.)

EL FRANCIO, krom la programo de Radio Libertaire anoncita en la junia tabelo, la privata stacio Radio Transistours en la urbo Tours dissendas per M.F. 93.8 MHz ĉiun lundon de 18.30 ĝis 19.00 GMT dulingvan programon en kaj pri Esperanto.

Eldonistoj de Esperantaj libroj, gramofondiskoj kaj sonkasetoj bonvolu atenti, ke Radio Pekino (Esperanto-Sekcio, Beijing, Ĉinio) pretas recenzi en siaj ĉiutagaj programoj la pli gravajn eldonaĵojn en la Internacia Lingvo. Metu tial ĝian adreson inter la ricevantoj de viaj specimenoj.

Ne sufiĉas nur aŭskulti radioelsendojn en Esperanto! Vi devas ankaŭ foje skribi al la redaktejoj. Radio-redaktoroj ne povas nombri siajn aŭskultantojn. Nur per viaj leteroj ili scios, kiom da homoj utiligas kaj deziras daŭre ricevi elsendojn en la Internacia Lingvo.

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn por 1983

1. Periodo de la abonvarba kampanjo:
Ekde la 1-a de novembro 1982 ĝis la 28a de februaro 1983. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la abonvarba kampanjo, povas profiti rabaton de 20% kaj senpage ricevi koloran kalendaron en Esperanto.

2. Abonprezoj:

(abon-periodo)	(aktualaj prezoj) Gld.	US$	(rabatitaj prezoj) Gld.	US$
1 jaro	12,60	6.00	10,08	4.80
2 jaroj	21,00	10.00	16,80	8.00
3 jaroj	29,40	14.00	23,52	11.20

(La supraj prezoj ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Legantoj en tiuj landoj bonvolu atenti la enlandan EPĈ-anoncon aŭ konsulti la peranton.)

3. Abonvarbado estas bonvena. La abonvarbanto povas sendi la kolektitajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel abonvarbanton, aŭ rekte al la ĝenerala distribuanto. Post plenumo de la aboniloj la ĝenerala distribuanto sendos al la abonvarbanto ĉinstilajn memoraĵojn.

4. Tuj abonu ĉe via loka peranto aŭ ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (poŝtĉekkonto 37 89 64). **Nederlandaj klientoj** bonvolu aldoni 4% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Petu prospekton kaj specimenon ĉe Guoji Shudian!

KUN *Alberta Casey*

AL LA NOVA JARO!

"SAN DIEGO VOKAS" kaj "AL VI DE MI" – du grandaj diskoj kun abundo de famaj melodioj (i.a. de The Beatles), en belaj tradukoj de Auld, Docal, Jordan, Minnaja k.a. Ambaŭ diskoj haveblas ankaŭ kiel KASETOJ. Al ĉio aldonitaj tekstoj. NOVA PREZO por ĉiu disko aŭ kaseto: 29,70 gld. Mendu ĉe: Alberta Casey, P.O.B. 626, La Jolla, CA 92038, Usono; aŭ ĉe la Libroservo de UEA.

Eldonejo -librejo SONORILO

L'espéranto dans l'enseignement, d-ro Pol Denoël. Ĵus aperis la dua eldono! 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado. Prezo: 100 Bfr.
Initiation théorique et practique, d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 180 Bfr.
Gluafiŝo: Internacia lingvo Esperanto: Ĵus aperis! Formato 16,6 x 7cm. Prezo: 25 Bfr.
Kartoj por la Nova Jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj). Prezo: 60 Bfr.

Eldonejo-Librejo SONORILO estas peranto i.a. de: *Heroldo de Esperanto* (Bfr.520); *El popola Ĉinio* (1 jaro: Bfr.180, 2 jaroj: Bfr.300, 3 jaroj: Bfr.420); *Monato* (Bfr.960).

Librejo SONORILO vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato! Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 100 gld. – 20%, por la mendoj super 100 gld. – 10%. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima libroservo, aŭ rekte ĉe: Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

---

jam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo ("unuaj libroj por esperantistoj") ne plu aĉeteblas ekster la kompleto. Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ▪ la inkunabloj de esperanto ▪ ni laboru kaj esperu! ▪ antaŭen al la laboro! ▪ tamen la afero progresas! ▪ hebreo el la geto ▪ kun gradaj paŝoj eksterlanden! ▪ klopodis organizi, sed vane! ▪ por kaj kontraŭ reformoj! ▪ mortinta, sed senmorta! ▪ Kromkajeroj: ▪ senlegenda biografio de l.l. zamenhof ▪ korespondaĵo ludovikologia ▪ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.



eldonejo ludovikito

Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

Se jes, la plej simpla kaj (se konsideri ĉion) la plej malmultekosta maniero por atingi tion estas anonci en ĉi tiu revuo. Memoru, ke la revuon legas pli ol 10 000 homoj en pli ol cent landoj. Rerigardu al nia tarifo de anoncoj (sur la dua kovrila paĝo) kaj vi facile konstatos, ke ne valoras cirkuleri al cent homoj, se vi por la sama mono povas per anonco atingi centoble pli vastan publikon. Pensu ankaŭ pri anoncado en la Jarlibro kaj Katalogo de UEA. Ekde 1983 "Kontakto" havos multe pli vastan legantaron sed ĝiaj anoncoj restos bagatelprezaj.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

POŜTMARKOJ RESTAS BONVENAJ

Ĉiu povas subtenadi UEA finance, sendante uzitajn poŝtmarkojn al la Centra Oficejo en Rotterdam. Antaŭdankon!



Mendu nun viajn UNICEF-salutkartojn por la Semajno de Internacia Amikeco (20a – 26a de febr. 1983). Dek kartoj kun kovertoj (minimuma mendokvanto): 11,00 guldenoj ĉe la Libro-Servo de UEA. (Sen rabato por revendistoj.)

Kontraŭmilita bildstria romano

La plej ampleksa verko en la bildstria ĝenro en Esperanto. Ĝi en streĉa maniero rakontas la hororon pri la unua atombombo en 1945. Tre flua traduko, kun lerta eltrovo de pluraj onomatopeaj esprimoj.



Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929 -). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld. **Mendebla ĉe la libroservoj de UEA, JEI kaj KLEG.**

LA NOVA TESTAMENTO. Noveldono, bindita en bela verda kovrilo. SKr. 25,00. **LA VIRO EN LA MORTOTUKO** de episkopo Sven Danell, traktanta novajn sciencajn faktojn pri la mortotuko en Torino. SKr. 20,00.
FÖRLAG GRÖNA STJÄRNAN, Landerig. 7, S-416 70 Göteborg, Svedio. Poŝtĉekkonto 8 84 51-0.

LA ALTERNATIVO

internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo

40 paĝoj, riĉe ilustrita
Petu provekzempleron ĉe: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio kontraŭ du internaciaj respondkuponoj.